

1983 decembro

76a jaro

n-ro 936 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Efikoj de ekstera informado

Vi trovos,

se vi foje mem spertos tian situacion, ke estas malfacile verki optimisman prologon al revuo, kiu malfruas du monatojn. Cetere, tio ĉi eventuale estas la cent-dek-unua enkonduko nia ĉi-speca, ĉar la numero kompletigas la dekan jarkolekton sub la (mal)zorgo de la sama redaktoro. Tamen, ni intencis nek jubilei nek tiel rekorde malfrui. Okazis, por ne ripetiĝi. Ĉar decembro estas librotaga monato, ĉu vi memoris – eĉ sen nia atentigo – aĉeti aŭ almenaŭ legi ian Esperantan libron? Aperas tuta amaso lastatempe. Aperos baldaŭ ankaŭ tiu aparta libro, kiun pluraj el vi atendas – la Katalogo de la Libro-servo de UEA. Ĝi estas preta kaj iros al la presisto tuj post la januara revunumero. Intertempe trovu ion interesan en ĉi tiu numero, precipe plurajn ekzemplojn de efika agado en diversaj landoj. Ĉu vi iam provis rigardi tiajn informojn kiel instigon kaj inspiron por via propra laboro?

Enhavo

- 201 Informado: Aliaj faras tion pli bone – kaj ankaŭ senpage (Simo Milojević)
- 202 Ekzemplo el Japanio
- 203 Instruado: Kursoj en preskaŭ okdek universitatoj (Karl Trimborn); Naŭ aspektoj de instruado (Japanio); Pli da profesiaj instruistoj (Bulgario)
- 204 Afriko: Jaro da agado en Reunio (Pierre Lelievre)
- 205 69a UK en Vankuvero: UEA povas peri ĉiuj viajn flugojn al Norda Ameriko (D. Masterman)
- 206 Landa agado: Impona korea kongreso
- 207 Pupteatra Internacia Festivalo: Japanoj kaj aliaj (S. Štimec)
- 208 Lingvo: Denove pri *preferi* (Odd Tangerud, Eugen Rytenberg, Alexander Hanke)
- 209 Reagoj: Ne ataki la tutan fronton samtempe (U. Broccatelli)
- 210 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 69a UK en Vankuvero)
- 212 Recenzoj: *Stranga kato* de V. Eroŝenko (W.A. Verloren van Themaat); *Nia tondro kaj Post ŝtormo* de B. Pasternak/K. Long (M. Duc Goninaz); *Du bulgaroj kantas en Esperanto* de M. Angelova kaj D. Denĉev (James F. Cool); *Neologisma glosaro* de H. Vatré (Wouter F. Pilger)
- 214 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 215 Nekrologoj (R. Grinŝpan, J.B. Kao, Ó.S. Magnusson, L. Óhúginn, P. Petit, S. Prohaskova, A. Starke, M. Šaponjić, J. Vítek)
- 216 Loke (mallongaj novaĵoj)
- 217 Indekso pri la 76a jarkolekto de la revuo *Esperanto*
- 220 Oficiala informilo de la CO de UEA; Anoncetoj

La kovrilo

Antaŭ du jaroj (aŭ simile) ni inaŭguris jarkolekton per kovrilo dediĉita al pupoj. Nun ni fermas la jaron per pupa kovrilo. Kial tiom da pupoj sur niaj kovrilpaĝoj? Simplas la respondo: la pupoj de Pupteatra Internacia Festivalo faras pli da laboro por Esperanto, ol multaj movadaj funkciuloj kaj aktivuloj kune, ol tutaj landaj asocioj. Se vi ne kredas, legu la konvinkan raporton sur la paĝo 207. Cetere, ni ja ŝuldas al vi la informon, ke la kovrila sceno okazas en la pupteatro "Totem" en Uppsala, Svedio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Aliaj faras tion pli bone – kaj ankaŭ senpage

En la Laborplano de UEA por la periodo 1983-1987, aperinta en nia novembra numero, la informado pri la Internacia Lingvo staras unualoke. Tia elstarigo de la informa laboro implicas profundan konscion, ke malgraŭ ĉiuj niaj ĝisnunaj sukcesoj kaj atingoj, ankoraŭ multo – se ne la tuta esenco de la mesaĝo, kiun kun si portas Esperanto – restas komunikenda al la granda plimulto de la mondo. Estus ja eraro – strategia –, se movado, kiu tiel plene malakceptas la nunan lingvopolitikon en la internaciaj rilatoj, kiel tion faras ni esperantistoj, havus alian ĉefprioritaton. Se nia supozo pri tiu malakcepto estas ĝusta, necesus, nun antaŭ la Centjara Jubileo, intensigi la informadon ĝis tiu nivelo, ke ĝi prezentiĝu kiel plena milito kontraŭ la nuna internacia lingva (mal)ordo.

Kiam ni nun rerigardus al la tuta jaro 1983, eblas tie vidi klarajn signojn, ke tiu "milito" jam komenciĝis: en pluraj landoj la informado pri la Internacia Lingvo intensiĝis ĝis nivelo neniam antaŭe atingita.

Ni ne parolas ĉi tie unuavice pri tiuj niaj eternaj flug- aŭ fald-folioj, al kiuj ni ial firme kroĉiĝis, tute ne rimarkante, ke ni vivas en epoko en kiu tiuj niaj modestaĵoj apenaŭ ion signifas. Ni volas ĉi tie atentigi

pri la informado, kiun por la Internacia Lingvo faras aliaj, aŭ kiun ni mem faras helpe de la scioj kaj rimedoj de aliaj – neesperantistoj.

Pri kelkaj tiaj ekzemploj ni jam skribis ĉi-jare. Rerigardu, ekzemple, la tekstojn pri Danlando kaj Soveta Unio en la januara numero, pri Afriko en pluraj ĉi-jaraj numeroj, pri Germana DR en la numero de aprilo, pri Britio, Brazilo, Japanio – diversnumere. Serĉu denove nian septembran numeron, por konsciiĝi, ke la informa efiko de la Kongreso en Budapeŝto estis tia, ke valoris nur pro ĝi kongresi tie. Jen nun kelkaj aliaj ekzemploj de tiu "ekstera", de tiu pli efika informado pri Esperanto.

La kvina numero de *Cahiers de l'Ecole de Traduction et d'Interprétation* (Kajeroj de la Lernejo de Tradukado kaj Interpretado) de la Universitato de Ĝenevo (Svislando) malfermiĝas per 20-paĝa sekcio "Esperanto – por aŭ kontraŭ", kiun unu el la redaktoroj de la kajero enkondukas jene: "Prezentante tri artikolojn favore al Esperanto, la redakcio... deziras stimuli la pripensadon de la eblecoj, kiujn tiu ĉi lingvo havas aŭ ne havas por fariĝi transnacia komunikilo, samefika kiel jam estas kelkaj sukcesaj naciaj lingvoj, ekz. la angla, la franca kaj kelkaj aliaj. Por multegaj personoj, ankaŭ famaj sciencistoj, Esperanto ne havas nek iam povos havi ŝancojn."

Ne gravas, ke tiu redaktoro, Furio Gabbrielli, tiel skeptike parolas, ĉar li agas malskeptike kaj sur tiuj 20 paĝoj lasas, ke por Esperanto verve pledu Claude Piron, Giorgio Silfer kaj Tazio Carlevaro. La franc-lingva teksto de Piron – "Mi, mi amas Esperanton" – okupas preskaŭ duonon de la disponigita spaco. Ĝi alportas la konatajn lerton kaj leĝerecon, kiuj el Piron faras eble la plej sukcesan (kaj tiel oftan) ple-danton por Esperanto en la lastaj jaroj. La itallingvaj tekstoj de Silfer – "La Esperanta literaturo – unika fenomeno" – kaj de Carlevaro – "Sociopsikologio de la Esperanto-movado" – estas malpli ampleksaj sed ne malpli konvinkaj. *Parallèles* (Paraleloj), kiel fakte nomiĝas tiuj ĝenevaj kajeroj, anoncas, ke per tiuj tri tekstoj la debato pri Esperanto komenciĝas.

Kiam en 1980 *Most* (Ponto), "jugoslavia revuo pri kroata literaturo", subite komencis utiligi Esperanton por la redakciaj indikoj, enhavtabelo kaj simile, ni ne rapidis prinoti tion ankaŭ en nia revuo (interalie pro la jugoslaveco de la redaktoro, kiu en similaj kazoj emas kvazaŭ perforti sian senpartiecon). Ni tiam kredis, ke temas pri provizora sukceseto de la iama Marinko Gjivoje. Tamen, Gjivoje mortis en 1982, kaj *Ponto* persistas en sia utiligo de Esperanto.


MOST

jugoslavia revuo pri kroata literaturo

1983 Vol. 12 No. 10
言語 10
大修館書店

特集 ● エスペラント入門

エスペラントの精神 (梅田 忠夫)
エスペラント入門 (松本 貴)
エスペラントの歴史 (伊藤 雄二)
エスペラントの未来 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)
エスペラントの国際性 (伊藤 雄二)



the bridge
le pont
el puente
MOCT
橋

**Jugoslavia kaj japana
revuoj, kiuj atentinde
kontribuas al la informado
pri Esperanto**

Tra la pasintaj kvar jaroj, en tiuj enhave kaj grafike elstaraj 100-paĝaj volumoj, kiuj aperas kvarfoje jare, Esperanto ofte miksiĝis kun la angla, franca, germana, hispana, itala, rusa, sveda, persa, pola, araba kaj deko da aliaj lingvoj en kiuj *Ponto* aperigis tradukojn el la kroata literaturo. En la lasta numero, kiu atingis nin – 1983/3, ni trovas klarigon pri la lingvopolitiko de *Ponto*. Tie, en la teksto "Al niaj legantoj", ni trovas i.a. jenon: "La lingva koncepto de nia revuo en la praktiko sendube mallarĝigas la eblecojn al unuopuloj tralegi ĉion, kion *Ponto* publikigas, sed aliflanke ĝi – almenaŭ principe – plilarĝigas la radiuson de la revua komunikado al la tuta mondo, emfazante per tio nian principan kaj kategorian konvinkon, ke oni egale devas esti ĉiujn popolojn kaj ĉiujn kulturojn, la plej grandajn, same kiel la plej malgrandajn. ... Sur la kovrilo de nia revuo la titolo *Ponto* prezentiĝas en ĉiuj kvin oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj: en la angla, franca, hispana, rusa kaj ĉina, kaj kiel helpa lingvo en la tipografiaj indikoj kaj en la indekso servas al ni Esperanto, kiun ni konsideras kiel lingvon de la internacia egalrajteco."

Tiu teksto aperas samloke ankaŭ en la angla, franca, germana kaj itala. Ĝi ne bezonas apartan komenton, ĉar la starpunkto de la redakcio de *Ponto* preskaŭ identas kun tiu de la Esperanto-movado. Ni eble "komentu" ĝin per senpage reklama informo: La adreso de *Ponto* estas: *Most*, Trg Republike 7/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; jarabono 10, unuopa numero 3 usonaj dolaroj.

Kiel ajn ni entuziasmas pri tia lingva politiko de *Ponto*, ni memoru, ke en Zagrebo jam delonge similaj aferoj okazas ankaŭ en la urbtrafika gazeto *ZET* kaj iasence ankaŭ ĉe la eldonado de la popularscienca revuo *Homo kaj kosmo* kaj ĉe la organizado de Pupteatra Internacia Festivalo, pri kiu ni raportas aliloke en ĉi tiu revunumero.

Aparta artikoleto, kiu sekvas ĉi tiun tekston, prezentas al vi japanan informan iniciaton en la revuo *Gengo* (Lingvoj). En unu el niaj pli fruaj numeroj ni menciis la Esperantan rubrikon en la itala magazino *Rivivere*. Tiu rubriko nun ampleksiĝis kaj enhavas ankaŭ Esperanto-kurson. Antaŭ nelonge usona novaĵagentejo (Associated Press), siainiciate, intervjuis la prezidanton de UEA, s-ron Maertens, kaj tiu intervjuo aperis en dekoj da usonaj ĵurnaloj. Estas ne tiom grave, ke la koncerna ĵurnalisto gluis partojn de tiu intervjuo al alia (negativa) opinio pri Esperanto, ĉar ni ne plu devas timi de aplombuloj, kiuj supraĵe deskribas la ŝancojn kaj kvalitojn de Esperanto. Tio, kio ja gravas, estas la multmiliono legantaro, kiu pere de tiu intervjuo rimarkis la aktivan ĉeeston de la Internacia Lingvo sur la scenejo de la internaciaj rilatoj.

Konklude, ni emus aserti, ke la informado pri la Internacia Lingvo nun estas pli intensa ol iam ajn antaŭe. Kial? Nu, ĉar Esperanto kaj la kulturo, kiu

vivas kun ĝi, nun povas proponi al la mondo multe pli ol ili povis antaŭ, ni diru, kvindek jaroj. Sed, ne maturiĝis nur ni kaj nia lingvo. Tio okazis kaj okazas ankaŭ al, ekzemple, Eŭropa Komunumo, kiu antaŭ deko da jaroj kredis, ke ĝi povas funkcii kun deko da laborlingvoj, kaj ĝi nun ne plu kredas tion kaj tial subtenas finance la projekton pri Esperanto kiel pontolingvo en aŭtomata tradukado (vidu anoncon pri tiurilata raporto sur la paĝo 199 de nia novembra numero). Tia ekstera informado pri Esperanto, kiun faras iuj aliaj, ne ni esperantistoj, estas tio, kio altigas la nivelon de la informa laboro al la nivelo pri kiu ni ĉi tie parolas. Tial ankaŭ niaj estontaj streboj sur la informa kampo devus sekvi tiun direkton. Ni ja bonvolu konscii, ke la studoj de Janton (*L'espéranto*), Forster (*The Esperanto Movement*), Lins (japana eldono de *La danĝera lingvo*), Lapenna (japana eldono de *Retoriko*), Wells (dana eldono de *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*) ktp. informe gravas nekompareble pli ol, ekzemple, tiu monumenta verko *Esperanto en perspektivo*, kiun povas konsulti nur ni esperantistoj.

Simo Milojević

Ekzemplo el Japanio

Dank' al la persista komento de Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, pri la japanlingva monata revuo *Gengo* (lingvoj) kaj lia ofta kontribuado per artikoloj pri Esperanto, la redakcio de tiu prestiĝa periodaĵo decidis prepari specialan numeron pri la Internacia Lingvo. Rezulte de tiu decido, duonon de la oktobra numero de 1983 (66 paĝojn) okupas ne malpli ol 18 artikoloj sub la kadra titolo "Speciala artikolaro por enkonduko al Esperanto". Pro spaca manko ni ne povas listigi ĉiujn titolojn, sed inter la verkintoj troviĝas multaj el la plej konataj nomoj en la japana Movado, kiuj traktas temojn lingvistikajn, historiajn, leksikologiajn, ideologiajn kaj aplikajn.

Eblas utiligi la revuon, eĉ se oni ne scipovas la japanan lingvon. Oni nome povas uzi ĝin kiel modelon de bona kaj prestiĝa prezento pri Esperanto – instigilon al aliaj similaj nacilingvaj revuoj fari simile.

En la decembra numero de *Gengo*, krome, aperis kvinpaĝa artikolo de Yosimi Umeda "Internacia kursaro de Esperanto en San-Francisko", kiu detale pri-skribas la somerajn kursojn ĉe la San-Franciska Ŝtata Universitato en 1983.

La revuon *Gengo* abonas pli ol dek mil lingvistoj kaj lingvostudentoj en Japanio. Ni ankoraŭ el multaj landoj aŭdis pri tiel sukcesa provo altigi la scion de la ĝenerala publiko pri la Internacia Lingvo antaŭ la Centjara Jubileo. Se vi deziras iniciati tian provon en via lando, unue petu detalojn de Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162 Japanio.

Kursoj en preskaŭ okdek universitatoj

Instrui Esperanton al estontaj instruistoj, tio devus esti unu el la bazaj trajtoj de la movada strategio. Se oni partoprenas la agadon sur tiu kampo, oni nepre bezonas samfakajn informojn el aliaj landoj, ĉar sencon havas – kiel cetere en iu ajn sfero de nia agado – internacie kunordigita laboro.

Rilate la instruadon, tiun bezonon celas kontentigi la broŝuro de Germain Pirlot *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo*, kies kvara ĝisdatigita eldono ĵus aperis (ĝi antaŭe aperis en la franc-lingva serio de *Esperanto-dokumentoj*).

Tiu utila dokumento koncize prezentas la leĝajn eblecojn pri Esperanto-instruado en la diversaj landoj, kie ĝi okazas kun diferenco rilate la instrunivelon, rezultojn kaj gradon de agnosko. Pirlot listigas preskaŭ ekskluzive kursojn je supera instrunivelo, kun detalaj indikoj pri instruanto, daŭro kaj universitata valoro, por – kiel li mem diras – helpi ”plifirmigi la jamajn Esperanto-kursojn, oficialigi tiujn, kiuj jam funkcias en universitataj rondoj, malfermi aliajn kie ajn eblas”.

Ĉi-foje la kompilinto liveras ion plian: Post esploro de diversaj fontoj, li komparas siajn infor-

mojn kun tiuj, kiuj estis pli frue registritaj aliloke. Tiel ni informiĝas pri la disvolviĝo de la oficialaj Esperanto-kursoj dum la pasintaj 30 jaroj. Ĉar plej ofte unu Esperanto-kurso reprezentas nur unu universitaton, el la dokumento de Pirlot okulfrappe evidentiĝas konsiderinda plialtiĝo de la renomo de Esperanto en la universitata medio: de 20 tiaj kursoj en 1953, kaj 30 en 1970, ni nun havas 79 kursojn en 1983.

Ĉu tio trafe prezentas la nunan situacion, pri tio ankaŭ Pirlot ne certas, ĉar oni ”facile komprenos, ke estas ege malfacile ricevi ĝustatempan, fidindajn sciigojn. Ekzemple, mi dissendis 145 demandarojn al 50 landoj, kaj ricevis 57 respondojn el 34 landoj.”

La broŝuro informas ankaŭ pri perspektivoj (leĝpropono en Francio, kreskanta grupo de parlamentanoj en Britio, ĉina edukpolitiko rilate Esperanton) kaj malprogreso (pri Irano ekzemple: ”Nun ne plu estas oficialaj Esperanto-kursoj en lernejoj”). Kiel perspektivojn Pirlot mencias ankaŭ kelkajn neoficialajn informojn, laŭ kiuj Esperanto-kursoj probable oficialiĝos en iuj universitatoj de Afriko, Azio kaj Sud-Ameriko.

Por sukcese malfermi Esperanto-kurson en sia universitato oni devas per bonaj argumentoj konvinki la koncernajn instancojn, informante ilin ne nur pri la edukaj kaj aliaj valoroj de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ pri tio, kio okazas aliloke je komparebla nivelo. Certe la broŝuro de Pirlot kuraĝigas, eble eĉ instigos al tia provo, por ampleksigi la universitatan instruadon de Esperanto.


Vi povas peti la broŝuron ĉe la kompilinto (Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio) aŭ ĉe la Libroservo de UEA; prezo: 3 internaciaj respondkuponoj (2,70 gld); por aerpoŝta sendo aldonu plian respondkuponon.

Karl Trimborn

Pli da profesiaj instruistoj

En *Bulgara esperantisto* (n-ro 11, 1983) Marin Bâcev informas, ke oni en Bulgario multe faris, por varbi profesiajn instruistojn al Esperanto-kursoj. Oni celas, ke ili poste instruu Esperanton en la lernejoj, ĉar jam de du jaroj oni, laŭ la decido de la Ministerio de Popola Klerigo, havas la eblecon instrui Esperanton en la bulgaraj mezlernejoj.

Dum 1981 pri Esperanto okupiĝis 1 687 gelernantoj en 98 klasoj, kaj dum 1982 1 785 gelernantoj en 91 klasoj. Sed la veraj ciferoj fakte estas pli altaj, ĉar ne



Studentino de la Esperanto-fako en Budapeŝto, kie la lingvo havas plej firman pozicion.

ĉiu distrikta estraro sendis raporton al Bulgara Esperantista Asocio (BEA).

Dum la pasinta lernojaro la nombro de la profesiaj instruistoj de Esperanto plialtiĝis. En la 20-tagaj specialaj porinstruistaj Esperanto-kursoj en Pisanica, studis kaj ekzameniĝis 90 geinstruistoj en ĉiuj kvar gradoj. Tamen, ankoraŭ ne en ĉiu lernejo estas profesia Esperanto-instruisto.

Estas interese, ke multaj el la kursanoj – profesiaj instruistoj – dum la pasinta lernojaro fervore lernis la lingvon sen interrompo en la unua, dua kaj iuj eĉ en la tria grado. Tio estis precipe instruistoj-filologoj.

Marin Bâcev, kiu estas la ĉefa metodikisto de BEA, sugestas, ke en Bulgario eble jam venis la tempo prizorgi la instruadon de Esperanto en universitatoj kaj superaj lernejoj.

Oni tamen konstatis, ke mankas taŭgaj lerniloj por pluraj instruniveloj. Aliflanke, en la komenco de la nuna lernojaro la Ministerio de Popola Klerigo aperigis *Gvidlibro por la Esperanto-instruisto*, komunan verkon de du spertaj esperantistoj.

Naŭ aspektoj de instruado

Japana Esperanto-Instituto ĉiujare organizas printempan kaj aŭtunan kunvenojn por diversaj studo-prezentoj, ĉefe esperantologiaj. Ĝia pasinta tia kunveno okazis la 5an kaj 6an de novembro en la Edukista Kultura Halo de la distrikto Mie, en la urbo Tu, sude de Nagoya. La naŭ prezentoj estis sub la komuna temo "Esperanto-instruado kaj ĝiaj metodoj". La prelegoj estis tiel ligitaj al praktika agado, ke ili vekis viglan diskutadon.

Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, prelegis pri siaj spertoj kiel gvidanto ĉe la Esperanto-kursaro ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato (vd. ankaŭ aliloke en ĉi tiu numero). Takasi Ōhara prezentis Internacian Esperanto-Kursejon en Pisanica, Bulgario. Yukio Izumi sugestis, kiel reorganizi la ekzamenan sistemon de JEI. Yosiaki Mizuno raportis pri la Esperanto-seminarioj, gvidataj de li en la Universitato de Tokio kaj la Universitato Meizi. Manabu Takahasi parolis pri la fondo de "eterkurso" per amatora radio. Oni nome rimarkis, ke radio-amatoroj, preteraŭskultinte Esperantan konversacion per radio, ofte ekinteresiĝas pri la lingvo. Nun propra stacio dissendas kurson, kaj ĝia kontakto-bulteno jam atingis sian 127an numeron. Aliaj prelegantoj traktis diversajn aspektojn de la Esperanto-instruado por japanoj.

Tiu regula studkunveno de JEI estas imitinda ekzemplo de agado ankaŭ por aliaj landaj movadoj, des pli ke ne necesas temi nur pri "interna aranĝo". Trafaj studoj allogos ankaŭ la atenton de eksteraj instancoj.

AFRIKO

Jaro da agado en Reunio

En la novembra numero de revuo Esperanto de 1982 ni raportis pri la fondo de Reunia Asocio por Disvastigo kaj Praktikado de Esperanto. Ni ĵus ricevis informan leteron pri la Esperanta agado dum la pasinta jaro sur tiu insulo en Hinda Oceano.

La 22an de oktobro ni festis la unuan datrevenon de la fondo de nia asocio. Samtempe ni havis nian jaran kunvenon, en kiu mi denove estis elektita kiel la prezidanto. Mi pensas, ke la momento por la unua bilanco jam venis, kaj ke povas interesi vin, kia fariĝis nia reunia Esperanto-asocio.

Ĉirkaŭ 20 personoj aliĝis al nia asocio, sed ni ne organizis regulan kurson. Ĉiuj devis lerni mem per la kursa libro *Junulkurso*, sed ni kunvenis ĉiun monaton. Tio ne permesis al niaj komencantoj fari sufiĉan progreson.

Pozitiva estas la fakto, ke dum tiu jaro ni havis multajn kontaktojn kun eksterlando. Ni ricevis pli ol cent leterojn el ĉirkaŭ 40 landoj kaj ni interŝanĝis kasetojn kun Brizbana Esperanto-Societo.


Niaj eksterlandaj kontaktoj ebligis al mi verki artikolon pri nia asocio. Du ĵurnaloj aperigis tiun artikolon, kaj semajna revuo intervjuis min, kio rezultigis tri-paĝan artikolon pri Esperanto.

Samtempe ni decidis anonci senpagan kurson en Le Tampon kaj perleteran kurson por la tuta insulo. Post tio, ĉirkaŭ 30 personoj kontaktis nin. Ĉar ni devis serĉi ĉambron por la kurso, la estro de la mezlernejo, en kiu mi instruas la germanan, konsentis, ke la kursoj okazu en klasĉambro de la mezlernejo, kaj eĉ instigis min malfermi kurson por la lernantoj. Mi do propagandis "oficiale" en miaj klasoj. La rezulto estas, ke ĉirkaŭ 40 lernantoj deziris eklerni Esperanton. De post la lasta semajno mi do gvidas tri kursojn: du por la gelernantoj de mia mezlernejo (infanoj 12-ĝis 15-jaraj) kaj unu por ĉirkaŭ 20 plenkreskuloj. Mi uzas la instrumentodon de *Ĉu vi parolas Esperante?* de Andrzej Pettyn, kiun donacis Japana Esperanto-Instituto.

La perletera kurso, kiun gvidas malnova esperantisto, s-ro Grondin, allogis ĉirkaŭ 15 personojn, kiuj loĝas dise tra la insulo. Estas eble, ke ni organizos klubon, certe kun kursoj, en la ĉefurbo S-ta Denizo en la proksima estonteco. Kaj ni eble povos organizi lernojan kurson en alia mezlernejo en la sudo de la insulo.

Mi pensas, ke la evoluo de nia loka movado estas do tre kuraĝiga, kaj esperas, ke ni povos firme teni la entuziasmon de niaj junaj kaj malpli junaj novaj esperantistoj. Ni almenaŭ klopodos tiucele.

Pierre Lelievre



Panorama rigardo al Vankuvero, kiu gastigos la 69an UK: Malmultaj urboj havas tiel fascinan situon kiel la ĉefurbo de la kanada provinco Brita kolumbio.

69a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

UEA povas peri ĉiujn viajn flugojn al Norda Ameriko

Kvankam UEA ankoraŭ ne trovis homon por plenumi la oficon de respondeculo pri turismo, pri kiu aperis reklamoj en ĉi tiu revuo antaŭ unu jaro, ni tamen provas evoluigi niajn turismajn servojn al la membraro.

Tiucele ni proponas al tiuj, kiuj volas vojaĝi al Norda Ameriko, ĉu por la 69a Universala Kongreso en Kanado, ĉu por la ĉirkaŭkongresaj eventoj, ĉu por alia celo, la eblecon mendi sian flugbileton pere de ni. Principe ni pretas peri mendojn por flugoj al Kanado kaj Usono el ĉiu parto de la mondo. Per amasa rezervado de flugoj ni povas negoci iom pli favorajn kondiĉojn ol unuopaj mendantoj kaj profitigi la Movadon; sed ni devas *jam nun* rezervi lokojn, ĉar temas pri la preperiodo por tiaj flugoj, el kiuj pluraj estas plenezervitaj.

Ni principe ne antaŭvidas organizi grupflugojn pro du kaŭzoj: unue, kiam temas pri Kanado aŭ Usono, estas ofte – ne ĉiam – neniu tarifa avantaĝo, malkiel en Eŭropo; due, rigardo al la diverseco de la esperantistaj eventoj en Ameriko klare montros la multecon de alvenpunktoj kaj -tagoj, sen paroli pri

foriroj, kio preskaŭ malebligas la formadon de signifa grupo de vojaĝantoj en la samaj loko kaj tago.

Por faciligi planadon, jen estas la listo de rilataj eventoj:

- | | |
|----------------|--|
| 7-21 julio: | ELNA-ekskurso en Usono (komenco en Nov-Jorko) |
| 13-20 julio: | 40-a Internacia Junulara Kongreso, Swanwick, Britio |
| 14-19 julio: | 32-a ELNA-kongreso / 3a Tutpacifika Kongreso, Portland, Usono |
| 14-20 julio: | Oficiala Antaŭkongreso de la 69a UK, Montrealo, Kanado |
| 21-28 julio: | 69a <i>Universala Kongreso de Esperanto</i> , Vankuvero, Kanado |
| 19 jul-5 aŭg: | Postkongresaj ekskursoj de la 69a UK, Brita Kolumbio, Kanado (fino en Vankuvero) |
| 29 jul-11 aŭg: | ELNA-ekskurso en Usono (fino en San-Francisko). |

Ni bezonas *jam nun* scii, kiu planas vojaĝi al Kanado kaj/aŭ Usono eĉ se tiu ankoraŭ ne aliĝis al la UK. Specife ni petas sciigojn pri: 1. kien vi volas

flugi? 2. el kiu flughaveno? 3. en kiuj datoj? Vi havos nenian financon sed vi donos al ni la eblecon akiri opciojn pri sidlokoj, kiuj estas – kiel dirite – jam tre malfacile haveblaj. Ni klopodos poste fari al vi oferton, kiu ŝparos al vi monon kaj subtenos la Movadon. Nuna sciigo probabligos certecon pri via flugo.

Kiam vi pensas, kiujn flughavenojn vi volas uzi, konsciu, ke nenio devigas vin uzi la saman flughavenon por la komenco kaj fino de iu rondvojaĝo, kvankam verŝajne kostos malpli reveni al la flughaveno, de kie vi komencis vian vojaĝon. Vi ankaŭ rajtas flugi al unu loko kaj reflugi de alia (ekzemple, nederlandaj partoprenantoj en la postkongresa ELNA-ekskurso verŝajne deziras flugi Amsterdamo-Vankuvero, San-Francisko-Amsterdamo, kio kostas ne multe pli ol revenbileto Amsterdamo-Vankuvero-Amsterdamo).

Notu, se vi estas brito aŭ intencas partopreni en la IJK en Swanwick, ke ni jam rezervis sufiĉe multajn lokojn de la apuda flughaveno, Manĉestro, al Vankuvero por la 20a de julio, kun du eblaj revendatoj al

Londono (je la 28a de julio aŭ la 4a de aŭgusto, laŭ elekto). Kosto: ĉirkaŭ 480 britaj pundoj.

Se vi povos flugi el Amsterdamo aŭ Frankfurto, ni antaŭvidas povi oferti revenbileton al Vankuvero kontraŭ proksimume 1 800-1 900 gld, depende de la tago de la flugo; al Nov-Jorko temos pri ĉirkaŭ 1 450 gld.

Se vi mendis ELNA-ekskurson en Usono (vidu anoncon aliloke en ĉi tiu numero), vi aŭtomate ricevos nian komunikon pri flugeblecoj.

Ni finas per du gravaj avertoj: unue, se vi vojaĝos al aŭ tra Usono, vi devas akiri vizon. Due, la kondiĉoj de la biletoj, kiujn ni klopodos akiri, ofte postulos, ke vi ne poste ŝanĝu vian vojaĝplanon kaj vi ne povos reklamaci la koston, se vi poste devas nuligi vian vojaĝon; tial ni forte konsilas al vi *asekuri vin* kontraŭ eventuala nuligo de viaj feri-planoj.

Kaj nun... bonvolu skribi al la CO de UEA por indiki viajn planojn aŭ esperojn laŭ la indikoj supre.

D. Masterman

LANDA AGADO

Impona korea kongreso

La esperantistoj en Korea Respubliko faris dum la lastaj jaroj multe da laboro, por vicigi sian landan Movadon inter la pli viglajn de la mondo. La 15a Korea Kongreso de Esperanto, kiu okazis la 22an kaj 23an de oktobro, donis – kiel lerte organizitaj naciaj kongresoj kapablas – tiel multe da inspiro, ke oni uzis pri diversaj ĝiaj programeroj la vortojn *brila* kaj *impona*.

Korea Respubliko apartenas al la landoj, kie la Esperanto-movado montras altgradan dinamismon: Podianoj dum la 15a Korea Kongreso de Esperanto.



La kongresejo estis en la universitato Danguk en Seulo. En la kongresa inaŭguro, kiu ricevis multajn laŭdojn pro sia lerta aranĝo, salutis la estro de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de la Korea Parlamento kaj la vicministro pri publika edukado. Ĉeestis ankaŭ la ambasadoro de Svislando. Sekvis la inaŭgu-

ron prelegoj de s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, pri "Internacia komunikado kaj lingvaj problemoj" kaj s-ro Gim Hjonuk, parlamentano kaj direktoro de Korea Esperanto-Asocio, pri "La rolo de Esperanto por mondpaco". Inter la ses japanaj esperantistoj, kiuj partoprenis la kongreson, estis s-ro Takasi Agou, sekretario de la Esperanta sekcio de Oomoto kaj komitatano de UEA, kaj s-ro Yosikatu Nagase, komitatano de JEI kaj entreprenema movada eldonisto.

Specialaj eroj en la kongreso estis festkunveno pro la eldono de la nova korea-Esperanta vortaro de Hajpin Li (vidu nian junian numeron, p. 112); la disendoj pri la kongreso helpe de pluraj esperantistaj radio-amatoroj kaj teatra prezentado de gimnazianoj el la urbo Degu.

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

Japanoj kaj aliaj

“La ora jaro de PIF” – tiel titoliĝis artikolo en la prestiĝa zagreba kulturgazeto *Oko*, por karakterizi la ĉi-jaran kunestadon de pupteatro kaj Esperanto en Zagrebo kaj Velika Gorica (Jugoslavio), de la 5a ĝis la 9a de oktobro. Dek kvar ensembloj el sep landoj, 50 prezentaĵoj, du pup-ekspozicioj, 120-minuta Esperanto-programo en la zagreba televido kaj 55 artikoloj en dudeko da jugoslaviaj gazetoj. Jen estas la statistika rikolto de la 16a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF).

Ĉi-foje PIF estis pli pupteatra kaj malpli Esperanta aranĝo. Nur iom pli ol duono de la teatraĵoj okazis en Esperanto (nur 28 teatraĵoj), ĉar la organizantoj devis cedi al premo de financantoj allasi al la programo ankaŭ nacilingvajn prezentaĵojn. Tamen PIF restas firme ligita al Esperanto. Ankaŭ pupistoj rimarkas, ke Esperanto donas al ĝi iom alian guston inter aliaj festivaloj.

La ĉefan spicon al la 16a PIF donis la ĉeesto de la japana pupteatro Musubiza el Nagojo. Ilia partopreno realiĝis dank’ al la energia engaĝiĝo de s-ino Kazuko Kikusima (Krizantemo), kiu dum la lastaj kvin jaroj modele preparadis grundon por efektiviĝi la gastadon.

La unua japana teatro ĉe PIF provokis grandegan interesiĝon ĉe ĵurnalistoj kaj diversaj kulturemuloj. Ĉar Esperanto kaj esperantistoj ebligis la ĉeeston de japana teatro en la oktobra kultura etoso de Zagrebo, neniuj plu kuraĝis grumbli kontraŭ la lingvo, kiu alvenigis ilin. Japanoj ĉarmis ne nur per sia folkloraj prezentaĵoj *La etulo Issunbōsi*. Ĝi estis enkonduko pri japanaj infanaj ludiloj kaj festivaleroj kaj proponis enrigardon en la japanan kulturon, per kiu PIF realigis sian plej elementan celon – alproksimigi per Esperanto kulturon de aliaj kaj stimuli intereson por ĝi. La japanoj montriĝis neelĉerpeble aktivaj: ili ludis sian teatraĵon 16 fojojn, senlace anstataŭante malhelpatajn ensemblojn, gvidis kurson pri paperfaldado, kaj krome ilin filmis la zagreba televido. Issunbōsi, la kuraĝa etulo el Nagojo, kiu aŭguste premiere gastis ĉe la japana kongreso, meritas ankoraŭ pli vastan publikon. Ĉu partoprenontoj de estontaj Esperanto-kongresoj en Azio povos konatiĝi kun ĝi?

Alia Esperanto-teatraĵo venis el Bulgario: granda 15-membra ensemblo el la urbo Tolbuhin plaĉis al infanoj per sia gaja *Kiam la lekanto ekfloras* de Rada Moskova. En ĝi aperas modela Esperanto en senriproĉe kvalita vesto de la bulgara teatra skolo. De jaro al jaro Bulgario liveras al PIF mirindan pupan mondon. Sur la grundo de bulgaraj pupteatraj atingoj ankaŭ PIF elkreskis al gustoakriĝo.



Japanaj geaktoroj surprizis ankaŭ lingve, kaj unu el ili (Hitosi Nagata, ĉi-supre) gajnis premion pro la ekstersceneja uzo de Esperanto.

Svedio surprizis la publikon per eĉ tri teatraĵoj de la pupteatro Totem el Uppsala. *La fajrilo* de Andersen, kun Lilian Gustavsson kaj Andrzej Dziedziul, gajnis la infanan premion de PIF.

La ombroteatro La Citrouille el Caen en Francio ankaŭ aplikis komentariojn en Esperanto por sia grafisme rava *Hastings*. En Jugoslavio ensceniĝis por la 16a PIF en Esperanto: *Pinokjo* el Sarajevo kaj *La lasta floro* el Ljubljana. La severan fakan ĵurion pleje impresis la nova zagreba teatraĵo *La avarulo* de Marin Držić, kies pupa interpreto eniras la antologion de jugoslavia teatro ĝenerale. Dank’ al tiu granda verko

kaj la aparta teatra personeco de Zlatko Bourek, enombriĝis pluraj aliaj partoprenintoj de PIF.

Pupoj rehejmiĝis kune kun siaj animantoj. La ekskursa renkontiĝo kun Esperanto finiĝis. Ĉu ne domaĝe? Ĉu esperantistoj de Svedio, Francio, Bulgario kaj Hungario aŭ Italio ne povus iel profiti de la fakto, ke la zagreba festivalo kreis profesiajn teatraĵojn en Esperanto en iliaj landoj? Aŭ ĉu tiu granda energiinvesto finiĝos per la papiliviva daŭro de la festivalo?

Ĉe la organizanto de PIF – Internacia Kultura Servo (Pf. 499, YU-41000 Zagreb) – restas tamen je via dispono la vidbendoj (VHS) de la ĉi-jaraj teatraĵoj. Antaŭ ol enarkivigi la riĉajn eventojn de la 16a PIF, oni decidis pri provoka datŝanĝo de la sekvonta festivalo. La 17a PIF okazos fine de aŭgusto, por ebligi eventuale pli multnombrian ĉeeston de esperantistoj. Bonvenon do, de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 1984, en Zagrebo, ĉe la 17a Pupteatra Internacia Festivalo.

Spomenka Štimec

LINGVO

Denove pri *preferi*

En *Esperanto* de oktobro 1983, paĝo 167, troviĝas artikolo de Bernard Golden pri "Preferi ol aŭ preferi al". Li konsentas kun PIV, ke "... oni post *prefer* uzas *al* antaŭ substantivo kaj *ol* antaŭ infinitivo."

Tiu regulo ne estas gramatike logika. La uzo de *preferi al* antaŭ substantivo montras, ke ni havas antaŭ ni prepozician esprimon. Tio ne ŝanĝiĝas, kiam ni uzas infinitivon anstataŭ substantivo, ĉar infinitivo havas substantivan econ. Aspektas ja tre strange skribi ekzemple: *Li preferas morton al perfido*, sed ne estas tiel pri: *Li preferas morti ol perfidi*. Ĉi tie ni ne havas esprimojn de grada komparo, sed prepoziciajn esprimojn. La ĝustaj frazoj sekve estas: *Li preferas morton al perfido* (= *anstataŭ perfido*); *Li preferas morti ol perfidi* (= *anstataŭ perfidi*).

Ni devas ekzameni niajn ekzemplojn ankaŭ en la komparacia rolo: *Mi preferas panon pli ol rizon* (= ... *pli ol mi preferas rizon*). Tio ne signifas, ke mi absolute ne ŝatas rizon, sed estas grado de ŝato. Ni povas ŝanĝi la frazon en prepozician esprimon: *Mi preferas panon al rizo*. Tio ne estas kompara grado, sed anstataŭigado.

La elipsa esprimo *Li estas pli granda ol mi* montras subjunkcian econ de *ol*, nome pere de la kompleta frazo *Li estas pli granda ol mi estas*. En la esprimo *Li preferas morti al perfidi* ne estas elipso, kiu povus ĝustigi la uzon de *ol*.

Zamenhof skribas (*Lingvaj respondoj*, 128): "la vortoj 'por' kaj 'anstataŭ', uzataj antaŭ infinitivo, havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de

konjunkcio, kaj en tiuj okazoj la uzado de substantivo apud ili estas ne ebla;..." Kompreneble vorto ne estas "preskaŭ" konjunkcio. Kiam oni scias, ke infinitivo havas substantivan econ, la klarigo estas tute simpla. "Anstataŭ stari..." (*LR*, 128) estas prepozicia esprimo. Prepoziciaj esprimoj ludas adverban rolon en frazoj. La "preskaŭa" senco de konjunkcio devenas de la fakto, ke infinitivo ĉefe estas verbo, kaj psikologie oni forlogiĝas al erara konkludo.

Odd Tangerud, Norvegio

Dum mia pli ol 60-jara aktiveco en Esperantujo mi renkontis unuafoje la strangaĵon *preferi al*, kiam mi vizitis la perfektigan kurson en julio en Abaliget, la sud-hungara ripozejo, tuj antaŭ la budapeŝta kongreso.

Kiam la kursestro provis instrui la kursanojn pri tio, multaj tuj protestis. Sekvis vigla diskuto. Iu montris hungaran lernolibron, kiu, sin apogante sur PIV, fakte konstatis, ke "preferi al" estas korekta se temas pri substantivoj, dum "preferi ol" rilatas verbojn.

Laŭ mi oni povas preferi ion el (inter) du aŭ pli da eblecoj. Ekz.: *Kion vi preferas: rizon aŭ panon? Mi preferas rizon*. Estas ankaŭ korekte diri: *Mi preferas rizon ol panon*. Mi prefere dirus: *Mi pli ŝatas rizon ol panon*, konsiderante ke la verbo *preferi* estas memstara kaj ne bezonas konjunkcion. Se vi diras, ke vi preferas buteron al pano, tiam mi respondas, ke mi preferas buteron al pano (ol rizon). Iu preferas lakton al teo, alia preferas citronon al teo ol lakton al teo. Kelkaj preferas akvon al vino, aliaj preferas puran vinon sen akvo.

S-ro Bernard Golden citas ekzemplon de Zamenhof: *Tion mi preferas al la manĝoj el kuirejoj de la plej bona hotelo*. Mem mi suspektas, ke tiu *al* estas simpla preseraro, se Zamenhof skribis permane kaj en rapideco *ol* povas facile aspekti kiel *al*, aŭ *tion* povas signifi, ke li preferas al la manĝo ekz. iun spicon ol ekz. salon.

Preferi al estas francismo, bedaŭrinde ne sola en PIV. Kion diras niaj gramatikistoj?

Eugen Rytenberg, Svedio

"Nuntempa (lingva) uzo" estas ŝatata preteksto, se oni ion ne povas ekspliki. Krom *al* kaj *kontraŭ* oni trovas en la literaturo post la verbo *prefer*- ankaŭ la prepoziciojn *antaŭ* kaj *anstataŭ*, kaj krom *ol* ankaŭ la subjunkcion *anstataŭ*. Komparante du infinitivajn verbojn, oni devas nepre uzi *ol* aŭ *anstataŭ*, ĉar la infinitivo mallongigas subpropozicion, kiu enkondukiĝas per subjunkcio. *Oni preferas morti ol senhonorigi* = *Oni preferas (tion), ke oni mortas, ol (tion) ke oni senhonorigas*. Memkompreneble *al* signifas nature *kompare al*, *kontraste al*, *rilate al*. La elimino de la adverboj estas afero de la stilrilata gramatiko. Tamen nur per helpo de la strikta struktur(ism)a gramatiko oni povas ekzameni, kontroli, analizi.

Alexander Hanke, Germana DR

Ne ataki la tutan fronton samtempe

En la junia numero de *Esperanto* aperis artikolo de S. Milojević pri parlamenta agado, sub la titolo "Utile en Strasburgo, sukcese en Bruselo", en kiu interalie oni diras: "Ni ne vidas kialojn, ke UEA trovu rimedojn por financi la parlamentan agadon en parto de Eŭropo, se ĝi ne sukcesas fari samon pri simila laboro en, ekzemple, Brazilo aŭ Ĉinio. Krome, estas sufiĉe absurde, ke UEA trovu monon por tiel intensa – kaj certe utila – informa laboro inter la eŭropaj parlamentanoj, dum ĝi aliflanke ne trovas sufiĉan monon por financi la pioniran agadon pri la disvastigo de Esperanto en Afriko kaj Azio."

Kun la premiso, ke laŭ mia opinio la okcidenteŭropaj esperantistoj devus fari tre pli grandan fortoŝtreĉon por finance kaj organize subteni la laboron ĉe la eŭropaj komunumaj institucioj kaj precipe ĉe la Eŭropa Parlamento, mi trovas tute ne absurda, sed

1. Internacia lingvo en la mondo jam ekzistas kaj ĝi estas vaste uzata en multaj internaciaj rilatoj (scienco, aviado, muziko ktp.). Tiu lingvo estas la angla. Tio ĉi estas fakto, eĉ se ĝi povas malplaĉi al ni. Tiun ĉi rolon la angla lingvo atingis danke al la granda politika, ekonomia kaj scienca potenco de Usono kaj al la fakto, ke en pluraj partoj de la mondo ekzistas gravaj landoj, kie la angla estas la denaska lingvo.

2. Por povi kun ŝancoj de sukceso konkuri pri la rolo de internacia lingvo kun la angla lingvo, kiu havas malantaŭ si la potencon de Usono, Esperanto devus havi malantaŭ si proksimume egalan potencon. Ĝi devus esti la lingvo de granda plurnacia demokrata ŝtato, kiu estus elektinta ĝin kiel demokratian solvon de sia propra interna lingvoproblemo.

Supozi, ke Esperanto povos iam fakte konkuri kun la angla pri tiu rolo *nur* danke al la laboro de la esperantista movado, tio estas, por uzi la plej mildan esprimon, simpla iluziula revado.

3. Okcidenta Eŭropo estas la sola parto de la mondo, kie ekzistas la ebleco, ke en la venontaj jar-



Ministra kunveno de Eŭropa konsilio: Ĉu Eŭropo estas "ŝlosilpunkto" de la lingvoproblemo?

male tre laŭdinda la fakton, ke UEA donas apartan subtenon al tiu ĉi agado.

Se la rimedoj bedaŭrinde ne estas sufiĉaj por fari efikan agadon en ĉiuj mondpartoj, tiam estas tute logike kaj racie, koncentri siajn klopodojn en la plej grava kaj decida punkto. Ĉu bona generalo, disponente je ne superabundaj fortoj, atakas la tutan malamikan fronton samtempe aŭ li koncentras sian atakon en unu "ŝlosilpunkton"?

Okcidenta Eŭropo estas ja vera ŝlosilpunkto por la Internacia Lingvo, pro la kialoj, kiujn mi klopodos klarigi ĉi-sube.

dekoj naskiĝos granda plurnacia demokrata ŝtato. Fakte la Eŭropa Komunumo estas nun en kriza situacio, el kiu ĝi povos eliri nur per transformiĝo al efektiva politika unio, al federacio. Se tio ne okazos, la Komunumo iom post iom disfalos kaj ties landoj estos pli kaj pli dependaj politike, ekonomie kaj kulture de la usona potenco.

4. Eŭropo estis ĉiam ekzemplo, en bono kaj en malbono, por aliaj mondpartoj: ĝi eksportis en Afrikon kaj Azion la modelon de nacio-ŝtato, generanto de malamo kaj militoj. Se ĝi sukcesos atingi federacian unuecon, ĝi eksportos al aliaj mondregionoj la

modelon de federacia plurnacia unuiĝo, generanto de paco kaj politika stabileco. Ĝi estos la unua paŝo al tutmonda politika unueco, kio estos verŝajne la politika tasko de la estonta jarcento. Tiu ĉi rolo de modelo valida por la tuta mondo estos la plej profunda ŝtatracio de la Eŭropa Federacio.

5. Se Eŭropa Federacio naskiĝos, ĝi havos antaŭ si, kune kun aliaj gravaj problemoj, ankaŭ la lingvan problemon. La alternativaj solvoj pri "eŭropa laborlingvo" aŭ "helplingvo" aŭ "federacia lingvo" estos fakte nur du: nacia lingvo (do, fakte, la angla) aŭ planlingvo (do Esperanto, en ĝia nuna aŭ eventuale en reviziita formo).

6. Elekto de la angla kiel eŭropa helplingvo estus kontraŭa al la bazaj principoj de la Federacio, ĉar demokrata ŝtato devas gardi la rajtojn de ĉiuj siaj civitanoj, kaj ĝi estus kontraŭa al ties ŝtatracio, ĉar ne bazita sur universala principo. Elekto favora al planlingvo, kontraŭe, estus plene konforma al la federaciaj principoj kaj al la "ŝtatracio" de la Unio. Do, se la Eŭropa Komunumo transformiĝos al efektiva politika Unio, tiam Esperanto havos unikan ŝancon, ne ripeteblan en aliaj mondpartoj.

7. La loko, kie oni laboras por la konstruo de

Eŭropa Unio, estas la Eŭropa Parlamento, elektita de la eŭropaj civitanoj; ĝi la 14an de septembro 1983 aprobis projekton de reformo de la Romaj Traktatoj (sur kiuj baziĝas la Komunumo); tiu projekto antaŭvidas formon de politika Unio, kiu, eĉ se ĝi ankoraŭ ne estas federacio, tre similas al ĝi. En februaro 1984 okazos la aprobo de la definitiva teksto, kiu poste transdoniĝos al la naciaj parlamentoj por la ratifo. Tiam komenciĝos grava politika batalo, en kiu la nova Eŭropa Parlamento, elektota en junio 1984, estos engaĝita fronte al la konservemaj naciaj fortoj. Se tiu batalo sukcesos, Eŭropa politika Unio naskiĝos.

8. Se la esperantistoj volas kapti tiun ŝancon por la Internacia Lingvo, ili devas ĉeesti tie, kie oni konstruas Eŭropon; ili devas ĉeesti tiam, kiam oni prenos decidojn pri la lingva problemo de Eŭropo. Ili devas fari tion eĉ, se necese, je la kosto momente forlasi ĉiujn aliajn batalkampojn. Se ili sukcesos konkeri la fortikaĵon "Eŭropo", tiam de ĝi ili povos konkeri la restantan mondon. Se ili malgajnos tiun batalon, tiam estos konsilinde por ili, dediĉi sian tempon al ellernado de la angla.

D-ro Umberto Broccatelli



Kongresa Komuniko

**69a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Vankuvero (Kanado)
1984 07 21 – 07 28**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de LKK: 53 North Boundary,
Vancouver, B.C., Kanado V5K 3S4.**

Kotizoj: Ekde la komenco de januaro validas novaj kotizoj ĝis la 14a de majo 1984:

Kongresano <i>ne</i> individua membro de UEA	210 gld/\$90
Individua membro de UEA	175 gld/\$75
Kunulo/junulo/handikapulo, kiu <i>ne</i> estas individua membro de UEA	140 gld/\$60
Kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas individua membro de UEA	105 gld/\$45

La supre menciitaj dolaraj prezoj estas kanadaj dolaroj kaj rajtas esti uzitaj nur de kanadaj aliĝantoj, kiuj aliĝas rekte al LKK. Ĉiuj aliaj aliĝantoj bonvolu pagi al la konstanta adreso per guldenoj.

Loĝado en Vankuvero: La venonta UK celas havi tute specialan etoson. Al tiu etoso kontribuos la loĝiga situacio, kiu – tute nekutime – proponas al kongresanoj la eblecon vivi en parto de la kongresejo mem. Tio havas certe malavantaĝon, ĉar mankas elekto de malsamspecaj ĉambroj, sed la evidentaj avantaĝoj estas, ke oni povos vivi inter esperantistoj dum la tuta semajno kaj ne devos veturi tra la urbo por atingi la kongresejon. Ĉio estas atingebla piede.

Ĉiu kongresano havos sian propran unulitan ĉambron kaj dividos kun kvin aliaj banĉambron kaj komunan ĉambron. Tiuj komunaj ĉambroj havas kuirrejan angulon (kie oni povas prepari malvarmajn manĝojn), grandan fridujon, brakseĝon kaj balkonon. Aliaj avantaĝoj de la loĝiga situacio en Vankuvero estas: manko de trafikbruo; bela panoramo de la balkonoj; liftoj de la malsupro de la kongresejo al la loĝĉambroj; dividoj de fumantoj disde nefumantoj en la komunaj ĉambroj; rapida trakto je alveno (dokumentoj ktp. troviĝos jam en la asignitaj ĉambroj).

Prezoj (sen manĝoj): unuopaj mendoj – po 70 gld nokte, kunulaj mendoj – po 53 gld. nokte. La meza nivelo de hotelprezoj en la urbo estas konsiderinde pli alta kaj la vojaĝo al la kongresejo postulas duonhoron en aŭtobuso el la centro.



Vankuvero restas tie fone (supre, maldekstre), por donaci verdon, maron kaj trankvilon al la Universitato de Brita Kolumbio, kie en julio 1984 gastos la 69a Universala Kongreso.

Junulaj aliĝoj: En la oktobra numero de *Esperanto* oni anoncis, ke partoprenantoj en la 40a Internacia Junulara Kongreso (en Swanwick, Britio, 13-20 julio 1984) rajtas aliĝi senpage al la 69a UK. Bonvolu atenti, ke temas pri IJK-anoj **malpli ol 26-jaraj je 1 jan. 1984**. UEA jam rezervis sidlokojn en flugoj el Britio al Kanado por tiuj, kiuj volas flugi de la IJK al la UK. Vidu nian artikolon pri flugoj al Kanado kaj Usono aliloke en ĉi tiu numero.

Fakaj asocioj: Ĉiuj fakaj asocioj jam ricevis mendilon por havi salonon kaj/aŭ budon dum la UK. Tiuj, kiuj ne ricevis ĝin sed volas mendi salonon aŭ budon, bonvolu skribi al la konstanta adreso. Limdato por tiaj mendoj: 31a de marto 1984.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno jam aperis. Ĝi enhavas la kutimajn sciigojn pri ekskursoj, loĝado, bankedo k.s. Ĝin akompanas unu mendilo por ĉiuj diversaj kongresaj servoj. La Dua Bulteno estos ekspedita nur al jam aliĝintaj kongresanoj.

Belartaj Konkursoj: En la Dua Bulteno aperas la tradiciaj sciigoj pri la Belartaj Konkursoj, kiuj okazas ĉiujare dum la UK. Tiuj detaloj estas troveblaj sur

paĝo 69 de la Jarlibro 1983 de UEA, sed ili nun devas esti suplementitaj de la artikolo sur paĝo 166 de la revuo *Esperanto* (oktobra numero). Tie estas detaloj pri nova branĉo: Kanto. Ne necesas ĉeesti la Kongreson por konkursi. Se vi interesiĝas pri kreado literatura, fotografia aŭ muzika, via talento povus eventuale esti rekonita en la kadro de la UK per publika prezentado kaj monpremio. Limdato por literaturaĵoj kaj muziko: 31a de marto. Limdato por fotoj: 1-a de julio. Kompleta regularo estas havebla ĉe la konstanta adreso aŭ ĉe la sekretario de la Belartaj Konkursoj: s-ro Alec Venture, 22A Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 0EF.

Cseh-instruisto serĉata: La pli intensa aktiveco de Internacia Esperanto-Instituto en la kadro de la UK postulas pli da kunlaborantoj, kiuj kapablas instrui laŭ la Cseh-metodo. Tiuj, kiuj kompetentas kaj intencas veni al Kanado, estas petataj anonci sin tuj al IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

Statistikoj: Ĝis nun aliĝis pli ol 360 kongresanoj el 35 landoj.

Kiel denaska aziano

Stranga kato, Vasilij Eroŝenko (1890-1952). El la japana trad. Yositaka Mine. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 1983. 82p. 18cm. Prezo: 15,90 guldenoj.

Eroŝenko certe ne estas nia plej granda stilisto, se oni komprenas per tio la rafinitecon de la vorta kaj fraza uzado. Nian lingvon li eĉ ne ĉiam uzis korekte. Sed li vivis interesan vivon kaj bone observis kaj mense prilaboris ĉion okazantan ĉirkaŭ li. Tial li montriĝis unu el niaj aŭtoroj plej interesaj – ankaŭ por publiko neesperantista, ĉar multajn el siaj verkoj li publikigis (aŭ traduke aŭ originale) en nacilingvaj revuoj.

Jen kolekto de kelkaj liaj rakontoj kaj paroladoj, tradukitaj el la japana lingvo.

Li estis vera kosmopolito, tial tre konforma al la Esperanta spirito, vojaĝis multe kaj absorbis ankaŭ la spiriton de la popoloj, inter kiuj li vivis. Pro la fabeleca karaktero de la unuaj kvin rakontoj kaj la mistikisma, ofte politeisma religio de ĉiuj, al mi kiel okcidentano ili ŝajnas preskaŭ kiel la verko de denaska aziano. Aliflanke la pacifismo kaj vegetarismo de *Stranga kato* estas tipe esperantismaj. En siaj du paroladoj por Esperanto la internan ideon li iom troigas, kvazaŭ internacia frateco estus ebla nur per Esperanto.

Sur p. 77 la kompilinto diras, ke li trudis al la tradukontoj malfacilan taskon. Tamen la tradukoj ne estas bonaj. Ili entenas multajn erarojn precipe koncerne la artikolon. Malgraŭ tio: libro tre leginda.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Fidele al Pasternak

Nia tondro, Boris Pasternak (1890-1960). El la rusa tradukis Kris Long. Bracknell: La tradukinto, 1981. 61p. Mimeo. 15cm. Prezo: 3,90 gld.

Post ŝtormo; Poemoj 1955-9, Boris Pasternak. El la rusa tradukis Kris Long. Bracknell: La tradukinto, 1981. 35p. 15cm. Prezo: 4,20 gld.

Tiuj du broŝuroj, ege modest-aspektaj (kaj ridinde malmultekostaj, kiel sufloras al la recenzontoj la tradukinto-eldoninto), signas eventon: la rusa, sed mondformata poeto Boris Pasternak, kies verkoj tradukiĝis en almenaŭ 23 lingvojn, ĝis nun ne trovis esprimrimedon en nia lingvo. Inter la kaŭzoj de tiu ĝisnuna manko, la malfacileco de la Pasternaka poezio – almenaŭ de ties unua periodo – ludas certe gravan rolon. Des pli aplaŭdinda estas la lerta laboro de Kris Long, kies talento estas jam konata al la legantoj

de *La kancerkliniko* kaj aliaj rekomendindaj revuoj, kiel *Fonto* kaj *Pola esperantisto*.

La unua libreto, titolita de la tradukinto *Nia tondro*, laŭ la titolo de unu poemo, entenas verkojn de la periodo 1914-22, t.e. el la famaj poemaroj *Super bariroj*, *Fratino Vivin'* kaj *Temoj kaj variacioj*. Bedaŭrinde nur, ke de la unua enestas nur tri poemoj kaj ke la versaĵoj de la periodo 1912-14 estas tute ellasitaj. La dua libreto, *Post ŝtormo*, enhavas la verkojn de la samtitola poemaro (nur kelkaj estas ellasitaj), t.e. poemojn de la jaroj 1956 (la tradukinto indikis ial 1955) ĝis 1959.

La tradukoj de Kris Long ĝenerale tre fidelas al la originaloj, kio estas vera heroaĵo, ĉar la tradukinto volis konservi ankaŭ la originalan ritmon kaj aranĝon de la rimoj (ili plej ofte estas asonancoj aŭ t.n. "abortaj" rimoj, kiujn Long kuraĝe defendas: "Pri poezio mi lernis de Pasternak, ne de Kalocsay."). Eldirinte mian admiron al Long kaj mian ĝenerale pozitivan takson de lia laboro, mi sentas min rajtigita surpape-rigi kelkajn kritikojn.

Kiel ofte okazas en tradukoj, iuj kunmetaĵoj – destinitaj al ŝparo de silaboj – estas apenaŭ elparole-blaj. Tiaj estas "kresk-ŝprucas" aŭ "fajrstang-ombr" (*Nia tondro*, p. 33 kaj 44). Kelkaj vortoj estas tradukitaj ne plene fidele, ofte por tre bona celo kaj kun ĝusta efiko, nome pro la semantikaj diferencoj inter la rusa kaj Esperanto – ja preferindas fideleco laŭsenca ol laŭvorta –, sed foje pro kaŭzoj, kiujn mi ne eltrovis. Ni supozu, ke "vivon verki" (*Nt*, p. 47) anstataŭ "vivi verse" estas postulata de la rimaranĝo kaj estas finfine pli elvokiva. Sed kial "bedaŭre" anstataŭ "funebre" (*Nt*, p. 41), "asigni al" anstataŭ "interŝanĝi" (*Nt*, p. 14) aŭ "pendigi la kapon" kaj "atencoj", kiam temas pri "mallevi la kapon" kaj "tumulto" (*Pŝ*, p. 17)? Kial "terure" (*Nt*, p. 7) anstataŭ "Terura!" (kio iel ŝanĝas la sencon). Ĉu surprize, ke iu "ŝteliras en nokt-vest' al lito"? (*Pŝ*, p. 7). La tradukinton embarasis *halat*. Sed, se traduki ĝin per "negliĝo", la senco reaperas. Ĉu la esperantista leganto komprenos, ke "Johano-kaj-Maria" (*Pŝ*, p. 9) estas melampiro (aŭ bovintritiko)?

Tre malmultas la mistradukaĵoj. Mi volas menci nur kelkajn diskutindajn punktojn ĉi-flanke. En *Vintra ĉielo* (*Nt*, p. 1), la bildo de la versoj 7-8 estas ial renversita:

*Turne desegnas glit-grincon stelare
en la norvegan ĉielon gravur'*

asertas Long, dum Pasternak diris, ke la glit-grinco gravure desegnas stelaron. En la sama poemo, la versoj 11-12 neklare redonas la duoblan komparon de la nokto kun serpentaj okuloj kaj kun domenpeco (ne necesis traduki laŭvorte *kost'* per "osto"), ĉar "sekco" (okuloj sekcitaj) ne sufiĉe elvokas la noĉojn (*razrez*) de la domenpecoj. En la du lastaj versoj de *Memore pri l' Démono* (*Nt*, p. 4), "per mont-glacimu-

roj" rilatas al "mi ĵuris", dum la tradukinto rilatigis ĝin al mi "reenlavangos". En *Pri ĉi poemoj* (Nt, p.5), "ne dum monato" estu komprenata kiel "monatojn longe" kaj "al infanaro krias" devas esti "krios". En *Knabino* (Nt, p.8), ne temas pri "parenc", el ĝardeno...", sed pri fratino vera aŭ propra (*rodnaja* rilatas al *sestra*) grandega kiel ĝardeno (*gromadnaja, s sad*). En *Pro superstiĉo*, "ĉiam kun la klink' enmane" ne rilatas al "vi", sed al "mi" (krome, "sin malimpliki" estas tro malforta por *vyryvat'sja*, "perforte eliri"). En *Ne tuŝu* (Nt, p.10), *moj drug* estas evidente "amikino", ne "amiko", kaj la ŝanĝoj de la korpopartoj de la versoj 3-4 ne estas pravigeblaj. En *Modelo* (Nt, p.11), la versoj 7-8 estas certe miskomprenitaj ("Neniun iam vekis la nuna viv-mirakl'" anstataŭ: "Neniun tuŝis, ke la viv-mirakl' daŭras nur horon"). La manko de *sekalo* (en *Sufoka nokt'*, Nt, p.26, v.7) detruas la bildon. En *Postparolo* (Nt, p.36) "ne mi peris vian sopiron" alisencigas la originalan "ne mi kaŭzis al vi aflikton". Preseraron mi rimarkis nur unu: en *Al Helena* (Nt, p.30), "rutro" legiĝu "putro".

Estas kompreneble, ke tiuj ĉi rimarkoj celas al diskuto kun la tradukinto kaj eventualaj plibonigoj por esperinda reeldono (laŭeble en vesto pli inda je Pasternak). Dume, mi rekomendas al ĉiuj poezi-amantoj senprokrastan akiron de tiuj juveletoj.

Michel Duc Goninaz (Francio)

Atento pri stilo

Du bulgaroj kantas en Esperanto, kantas Maria Angelova kaj Dimitro Denĉev. Fortepiana akompano de Sneĵana Barova. Sofia: Balkanton, 1982 (ne indikita). 30cm. 33 t/m. BOA 10972. Prezo: 18,00 guldenoj.

Dum la lastaj Universalaj Kongresoj, la arto de la sopranulino Maria Angelova famiĝis. Nun oni povas aŭdi ŝin per altnivela disko, kiun proponas la bulgara disk-eldonejo Balkanton. La dudeko da arioj, lidoj, popolkantoj kaj duetoj varias ege laŭ stilo kaj postulas grandan adaptiĝeblon de la artistoj. Ĉe Maria Angelova, oni foje dezirus pli stabilan kaj malpli akran tonon, sed oni admiras la ĝustecon de ŝia klera kaj simpatia interpretado. Dimitro Denĉev posedas tenor-voĉon baritonecan kaj iom nekularan. Ĝi ne ideale taŭgas por la malpezaj pecoj (ekz. tiuj de Bellini kaj Bizet). Kompanse, ankaŭ li kantas kun atento pri stilo. Li prononcas iom pli klare ol Angelova.

Se diri la veron, preskaŭ neniom oni povas kompreni de la tekstoj kantataj. Estas konate, ke malofte kantataj vortoj bone kompreniĝas. Pro tio, disk-eldonejoj kutimas provizi foliojn kun ĉiuj tekstoj – kaj ofte kun informoj pri muziko, komponistoj, tradukoj, kantistoj ktp. Bedaŭrinde, ĉi-diske mankas ĉio.

Oni aĉetu kaj ĝuu la diskon. Sed oni ankaŭ instigu al Balkanton, ke eldononte pliajn Esperantajn diskojn, ĝi ne forgesu pri tekstoj.

James F. Cool (Usono)

Se mankas glosaro...

Neologisma glosaro; Eta postrikolto al PIV, Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 48p. 21cm. Jubilea Eldon-Serio 3; Esperantologio 4. Prezo: 7,50 gld.

Jen vortareto de kaj neologismoj kaj arkaismoj. La aŭtoro kombinis glosarojn de multaj verkoj kaj aldonis vortojn el malnovaj vortaroj, kiuj ne troviĝas en PIV. Eĉ (prave!) vortojn, kiuj ja troviĝis en ties antaŭulo PV. Vi do trovos, miksite, la plej freŝajn neologismojn de Karolo Piĉ kaj jam (prave?) forgesitajn proponojn el la dudekaj jaroj, kune kun vortoj, kiuj kaprice elfalis el PIV (kiel la ŝajne ne sufiĉe pariza *navedo*).

La pli-malpli hazarda elekto de la fontoj havas kiel malavantaĝon, ke oni trovas ekzemple la terminon *duonduto* (en muziko: duontono da diferenco), dum la vorto *duto* (du-to, kiel kvar-to, kvin-to) kiu troviĝas en *Muzika terminaro* (2a eld. 1960, p.7) de M.C. Butler, mem ne enestas. Cetere ankaŭ enestas iuj vortoj jes ja troveblaj en PIV, kvankam kun ali(fak)a signifo-nuanco, ... kaj evidentaj fakterminoj ne komunlingvaj.

Do, eble, listo por legantoj de malnovaj kaj novaj verkoj kun nekutimaj vortoj, kiuj ne mem enhavas glosaron. Mi ne konsilus ekuzi la menciitajn vortojn senkritike. Iuj ja prave jam dum jardekoj kuŝas sub polvo. Kaj aliaj tuj post elkoviĝo aliĝis al ili. Ĉiuokaze, se vi uzos vorton el tiu ĉi listo, vi havos preskaŭ garantion, ke oni ne bone komprenos vin.

Interese estas esplori la fontojn de la vortoj. Piĉ ĉerpas el la pura latina kaj ankaŭ ne timas prunti el ne-latinidaj lingvoj. Bennemann antaŭ la Dua Mondmilito utiligis germanajn radikojn, sed plej multaj neologismemuloj ŝajne pensas, ke Esperanto estas iu dialekto de la franca.

Kritikon mi havas pri la antaŭparolo. Tie troviĝas la sugesto, ke tradukantoj de poezio trovu ĉi tie vortojn kun ekzemple unu silabo pli aŭ malpli (kiel *hati* anstataŭ *malami*), aŭ kun pli taŭga rim-finaĵo. Kiel iome-tradukinto de poezio, mi sentas tion kiel insulton pri la arto. Iu, kiu tradukas normalan vorton de la originalo per nenormala vorto de la cellingvo, *mistradukas*. Senkonsidere, ĉu la nenormala vorto estas neologismo, arkaismo aŭ ne-komunlingva faktermino. Senkonsidere, ĉu temas pri prozo aŭ poezio.

Kompreneble neniu devigas vin, sekvi tiun sugeston de la antaŭparolo. Kaj estas plaĉe scii, ke iu jam pli frue uzis la vorton *abrakadabro*!

Wouter Pilger (Nederlando)

Laste aperis...

Brazilaj aruakoj, La, F. Valdomiro Lorenz. Brasília: Laborgrupo "Antaŭen", 1983. 52p. Ilus. 22cm. Serio Brazilaj Kajeroj, n-ro 3. Etnografia studaĵo pri brazilaj indianoj, kun bibliografio. Prezo: 4,80 gld.

Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU, Prezidanto de Prezidio de Supera Soveto de USSR, Jurij Andropov. El la rusa trad. V. Arolovič. Moskvo: APN, 1983. Prezo: 1,20 gld.

Distributed Language Translation. Feasibility Study of a Multilingual Facility for Videotex Information Networks, A.P.M. Witkam. Utrecht: Buro voor systeem-ontwikkeling, 1983. 370p. Ilus. 30cm. ISBN 90 70730 01 4. Anglalingva raporto pri la projekta stadio de studo krei duonaŭtomatan traduksistemon, uzante Esperanton kiel pontolingvon; kun resumoj en la dana, franca, germana kaj nederlanda. Speciala prezo por la Esperanto-movado: 57,50 gld. (normala librovendeja prezo: 127,50 gld). Sen rabato por la revendistoj.

Eklegu komencanto, komp. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1983. 9p. Ilus. Mimeo. 21cm. Legmaterialo por komencantoj. Prezo: 1,80 gld.

Elementa kurslibro de Esperanto (1980), Cho Sung Ho. Seulo: Korea Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 45p. 26cm. 18-leciona lernolibro laŭ gramatika metodo, kun traduk-ekzercoj. Prezo: 6,30 gld.

Elpafu la sagon; El la buŝa poezio de la mondo, komp. Tibor Sekelj (1912). Rotterdam: UEA, 1983. 187p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 18. ISBN 92 9017 025 5. Antologio de buŝa poezio, grandparte de popoloj, kies kulturo ankoraŭ ne estis reprezentita en Esperanto. Prezo: broŝurite 27,00; bindite 36,00 gld.

En la koro de Eŭropo; Esperanto en arta kuirejo de ĉefaj poetoj kaj prozistoj, komp. Josef Rumler. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 32p. 21cm. Literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj kun komentarioj. Prezo: 1,80 gld.

Esperanta terminaro de terminologia fako, Jan Werner. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1982. 14p. Mimeo. 29cm. Esperanta, ĉeĥa, angla terminaro, bazita sur rekomendo de Internacia Normiga Organizaĵo (ISO). Prezo: 3,60 gld.

Esperanto: jifunze lugha ya kiesperanto, Nino Vessella. Rotterdam: UEA, 1983. 56p. 22cm. ISBN 92 9017 026 3. La unua lernolibro por svahillingvanoj; laŭ adapto de *Esperanto for Beginners* de M. Butler, kun vortareto. Prezo: 9,00 gld.

Esperanto: internacia lingvo; Kurso por la elementa diplomo (1976), A.J.F. de Wit. Vogelenzang (ne indikita): Federacio de Laboristaj Esperantistoj, 1983 (2a eld.). 178p. 21cm. Mimeo. ISBN 90 70843 01 3. 25-leciona, duagrada lernolibro por nederlandlingvanoj, bazita sur la gramatika kaj rekta metodoj. Prezo: 16,50 gld.

Esperanto: internacia lingvo; Praktika kurso de Esperanto (1976), A.J.F. de Wit. Vogelenzang: Federacio de Laboristaj Esperantistoj, 1983 (2a eld.). 158p. Ilus. 21cm. Mimeo. ISBN 90 70843 02 1. 20-leciona elementa kurso por nederlandlingvanoj, bazita sur la gramatika kaj rekta metodoj. Prezo: 10,20 gld.

Esperanto-urdu dialogoj, S.A. Farani. Karam Shah: Pakistana Esperanto-Asocio, 1983. 32p. Ilus. Mimeo. 21cm. Simplaj frazoj kun tradukoj en la urdua. Prezo: 2,40 guldenoj.

Geodezia fakterminaro en ses lingvoj, komp. Csatkai, Winkler, Haszpra k.s. Budapeŝto: Budapesti Geodéziai és Térképészeti Vállalat. **1-a parto:** Kompensuma kalkulado, supera geodezio, landa mezurado, 1976 (322p.); **2a parto:** Instrumentoj, iloj, instrument-teknikaj nocioj, 1978 (388p.); **3a parto:** Elementa geodezio, parcelado, urb-ordigo, katastro, grundoklasifo, 1980 (374p.); **4a parto:** Topografio, 1981 (343p.). 25cm. En la lingvoj angla, Esperanto, franca, germana, hungara kaj rusa. Prezo: po 33,00 gld. por unu parto.

Geologio internacia, Volumo 4, red. E.D. Máfi. Varsovio: Instytut Geologiczny, 1982. 141p. Ilus. 21cm. ISBN 83 220 0181 9. Dek kvin fakaj artikoloj kun pollingvaj resumoj. Prezo: 9,00 gld.

Kiel diri...?; Praktika Esperanta frazeologio, L. Lentaigne. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1983 (2a eld.). 143p. Mimeo. 21cm. Kvin mil vortoj kaj esprimoj, laŭteme aranĝitaj, kun alfabeto indekso. Utila suplemento al la *Proverbaro*. Prezo: 9,00 gld.

Komputika vortaro Esperanto-ĉeĥa, ĉeĥa-Esperanta, komp. František Cabák. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1982. 30p. Mimeo. 21cm. Fakvortareto, kiu rekte rilatas al la kvinlingva hungara *Komputil-teknika vortaro*. Prezo: 6,30 gld.

Krado-mondo (1974), Encarnación Ferré. El la hispana trad. F. de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 144p. 21cm. Jubilea eldonserio: 2 Beletro tradukita 3. Premiita romano pri la psiko de virino en malliberejo, de nuntempa hispana aŭtorino. Prezo: 45,00 gld.

Kroatia poezio. Komp. Ivan Krtalić. Red. Spomenka Štívec. El la kroata trad. diversaj. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1983. 296p. 20cm. Antologio, kiu prezentas la tutan riĉon de la kroata poezio dum la pasintaj 150 jaroj, per poemoj de ĉ. 70 poetoj en interpreto de dudeko da tradukintoj (i.a. Rotkvić, Vančik, Velebit, Brozović). Kun biografiaj kaj bibliografiaj notoj. Prezo: 39,00 gld.

Legu aktivulo, komp. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1983. 16p. Mimeo. 21 cm. Bazaj informoj pri Esperanto kaj ĝia movado por novlernintoj. Prezo: 1,80 gld.

Legu progresanto, komp. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1983. 14p. Ilus. Mimeo. 21cm. Legmaterialo por duagradaj kursoj. Prezo: 1,80 gld.

Lokis (1869), Prosper Mérimée (1803-1870). El la franca trad. Marcel Delcourt (1914). Parizo: UFE, 1983. 40p. Ilus. 21cm. Speciala literatura numero de *Franca esperantisto*, n-ro 345. Unu el la plej lertaj noveloj el la franca literaturo de la 19a jarcento; pri la superstiĉo de la homo-urso. Prezo: 7,50 gld.

Mia vivo; Artikolaro; Poemaro (1975), N. Bartelmes (1897). Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais "Laŭte", 1982 (2a eld.). 91p. 21cm. Broŝurservo de SAT. Aŭtobiografio kaj dek elektitaj artikoloj de Norbert Barthelmess, la konata gvidanto de SAT; kun poemaro, kiu ne aperis en la unua eldono. Prezo: 4,20 guldenoj.

Międzynarodowa komunikacja językowa/Internacia lingva komunikado, red. Tadeusz Ejsmont. Łódź: Uniwersytet Łódzki, 1983. 304p. Mimeo. 24 cm. 25 pol-

lingvaj artikoloj el konferenco, organizita de Studenta Scienca Esperantista Rondo de la Universitato de Łódź, kun Esperantaj resumetoj. Prezo: 21,00 gld.

Mortonorilo de Chambley, La, Karolo Pič (1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 249p. 21cm. Jubilea eldonserio: 1 Beletro originala 4. Krimromano, verkita en 1959, antaŭ *La litomiŝla tombejo*, kun ĉapitro pri la verkaj principoj de la aŭtoro; antaŭparolo de Henri Vatré. Prezo: 51,90 gld.

Originala verkaro (1929), L.L. Zamenhof. Komp. J. Dietterle (1866-1943). Ōsaka: Oriental-Libro, 1983 (fotorepreso). 604p. Ilus. 22cm. Bind. La unua klopodo kolekti originalajn verkojn de Zamenhof (antaŭparolojn, artikolojn, traktaĵojn, paroladojn, leterojn kaj poemojn), kiu ludis gravan rolon en la evoluo de la Esperanto-literaturo. Prezo: 72,00 gld.

Pełny podręczny słownik esperancko-polski; Du volumoj, komp. Tadeusz J. Michalski. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1982. 606p. Mimeo. 20cm. Esperanto-pola vortaro kun ĉiuj radikoj el pli fruaj polaj vortaroj. Prezo: 30,00 gld.

Questões gramaticais, Porto Carreiro Neto. Brasília: Laborgrupo "Antaŭen", 1983. 43p. Ilus. 22cm. Serio Brazilaj Kajeroj, n-ro 2. Portugallingvaj artikoloj pri la strukturo de Esperanto kaj gramatikaj demandoj. Prezo: 3,60 gld.

Reviziita raporto pri la algoritma lingvo Algol 60, J.W. Backus k.a. El la angla trad. S.P. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (neindikita). 64p. Mimeo. 26cm. Pri multe uzata komputila programlingvo. Prezo: 7,50 gld.

Roko de sorĉisto, La, Józef P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1983. 9p. Ilus. Mimeo. 21cm. Rakonto por progresantoj. Prezo: 1,80 gld.

Saĝo-sako; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina trad. Fan Yizu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 73p. Ilus. 18cm. Mallongaj rakontoj de mongoloj, tibetanoj, kazaĥoj kaj jaŭoj; taŭga i.a. kiel postkurso legaĵo. Prezo: 3,00 gld.

Sachsenhausen, Eduard Ullmann (red.). Sen bibliografiaj indikoj. 32p. (nenumeritaj), 21cm. Broŝuro kun dokumentoj kaj bildmaterialo pri la iama koncentrejo Sachsenhausen. Prezo: 1,80 gld.

Semo de Esperanto, La; N-ro 1. Kôbe: Esperanto-Societo de Kôbe, 1983. 50p. 13cm. Japanlingva "ŝlosilo" al Esperanto. Prezo: 2,40 gld.

**EKDE LA KOMENCO DE 1984
VALIDAS NOVA – PLI FAVORA –
REGULO PRI LA SENDOKOSTOJ
(VIDU ĈI-SUBE).**

**LA NEDERLANDAJ KLIENTOJ
BONVOLU ATENTI, KE
ŜANĜIĜIS ANKAŬ LA TARIFO
DE LA ENLANDAJ IMPOSTOJ.**

Sovetskaja interlingvistika; Annotirovannaja bibliografija za 1946-1982 gg., komp. A.D. Duliĉenko, red. Paul Ariste. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1983. 88p. 20cm. Ruslingva bibliografio kun detaloj pri 410 sovetaĵoj kaj aliaj verkoj interlingvistikaj. Prezo: 7,50 gld.

Stranga kato, Vasilij Eroŝenko (1890-1952). El la japana trad. Yositaka Mine. Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 1983. 82p. 18cm. Kolekto de mallongaj rakontoj. Prezo: 15,90 gld.

Vocabolario Italiano-Esperanto. Verona: Istituto Italiano di Esperanto, 1981. 18 + 494p. 17cm. Vortaro kun ĉ. 25 000 serĉvortoj kaj skiza gramatiko. Prezo: 27,00 gld.

Vortaro japana-Esperanta. Kompilis Masao Miyamoto (1913). Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1983. 1083p. 19cm. Plaste bind. La plej ampleksa (ĉ. 70 000 kapvortoj, kun multaj ekzemploj) japana-Esperanta leksikologia verko kaj verŝajne unu el la plej kompletaj vortaroj de la Internacia Lingvo. Prezo: 63,00 gld.

Wir lernen Esperanto; Vollständiges Lehrbuch der internationalen Sprache (1910), F. Mally kaj B. Müller. Offenbach am Main: Intertrans-Verlag, 1983 (3a eld.). 69p. Ilus. 21cm. ISBN 3 8223 0072 1. Lernolibro laŭ gramatika metodo, kun aldonajo *Wie lernt man Fremdsprachen?* Prezo: 24,60 gld.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Erich-Dieter Krause. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1983. 596p. 20cm. Bind. Germana-Esperanta vortaro kun pli ol 40 000 serĉvortoj. Ellaborita science kaj kompetente, ĝi estas unu el la plej kompletaj leksikologiaj verkoj en Esperanto. Prezo: 21,00 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj
de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoni-
iĝas 5 %, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19 % por
la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas
10 % por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas
5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!**

ROMANO GRINŠPAN (1915-1983) mortis la 1-an de julio en Taŝkento, Soveta Unio, kie li estis fakdelegito pri muziko. Li estis konata pro siaj tradukoj i.a. de ĉiuj fabeloj de Kornej Ĉukovskij, klasikaĵoj de la soveta infanliteraturo.

SE-TIEN (John B.) KAO (1906-1983), dekanano kaj profesoro en la Universitato Fu-Jen, mortis la 8an de oktobro en Tajvano, Ĉinio. Li lernis Esperanton en Ĉinio kiel seminariano de Giovanni Ricci. Poste lia profesio kiel sacerdoto portis lin al multaj landoj, kie li agadis por Esperanto. Li aparte helpis la Movadon en Suda Ameriko. Li kunaŭtoris la informlibron *Esperanto, the International Language* (1948) kaj verkis ĉinlingvan informlibreton por tajvananoj. Li estis delegito kaj fakdelegito de UEA.

ÓLAFUR S. MAGNUSSON (1918-1983) mortis la 18an de oktobro en Rejkjaviko, Islando, kie li estis unu el la plej konataj esperantistoj. Li lernis la lingvon en 1935, poste instruis ĝin en mult-

aj kursoj kaj fondis la Esperantistan Societon "Aŭroro" en Rejkjaviko en 1944, kies prezidanto li estis entute 25 jarojn. Li kunredaktis la altnivelan revuon *Voĉo de Islando* (1949, 1958-1960) kaj estis estrarano de Federacio de Islandaj Esperantistoj (poste Islanda Esperanto-Asocio) ekde 1959. Li ankaŭ multe tradukis el la islanda literaturo en Esperanton. Li estis dumviva membro de UEA.

LORCÁN ÓHUGINN (1910-1983), emerita parlamenta raportisto, mortis la 1-an de novembro. Li estis membro de UEA ekde 1938, poste delegito en Dublino, Irlando, kaj post elmigro al Kanado fakdelegito pri juro en Otavo.

PIERRE PETIT (1904-1983) mortis la 25an de oktobro en Nyons, Francio. Li lernis Esperanton en 1919 kaj iĝis aparte aktiva sur ĉiuj niveloj de la Movado. Li estis kunorganizanto de pluraj gravaj internaciaj Esperantaj konferencoj kaj turismaj aranĝoj. Petit estas aparte

konata pro la iniciato (kun R. Llech-Walter) de internacia konferenco de popoluniversitatoj en 1957, kie Esperanto rolis kiel laborlingvo. En la franca Movado li funkciis i.a. kiel sekretario kaj prezidanto. Li estis estrarano de UEA de 1947 ĝis 1949.

STEFKA PROHASKOVA, eminenta bulgara aktorino kaj reĝisorino, forpasis antaŭnelonge en Sofio. Prohaskova estis intime ligita al Bulgara Esperanto-Teatro, por kiu ŝi reĝisoris plurajn spektaklojn, i.a. *Ĉasantoj de oficoj* (UK 1959, Varsovio), *Komedio de eraroj* (UK 1963, Sofio), *Amo* (UK 1979, Lucerno).

MOMČILO V. ŠAPONJIĆ (1920-1983), universitata profesoro kaj unu el la plej elstaraj jugoslaviaj esperantistoj, mortis en Beogrado la 22an de oktobro. Li lernis Esperanton en 1932, helpis reorganizi la lokan kaj landan movadon post la Dua Mondmilito kaj dum multaj jaroj okupis en ĝi gvidajn funkciojn (prezidanto de Serbia Esperanto-Ligo, vicprezidanto de la landa Esperanto-organizaĵo, direktoro de Esperanto-instituto, komitatano de UEA ktp.). Šaponjić estis prezidanto de LKK de la 58a Universala Kongreso en Beogrado

DONU MONON NUR AL TIUJ, KIUJ NE BEZONAS ĜIN!

Ĉi tiu malnova saĝaĵo – konata en la financaj medioj – validas ankaŭ por ni, kaj ni aplikas ĝin al tiuj, kiujn ni subvencias. Ni ne bezonas monon por ni, ĉar ni estas Institucio Hodler '68 – la plej granda mecenato en la Movado. Ni jam disdonis 100 000 guldenojn por pluraj Esper-



antaj projektoj. Por plivastigi nian agadon, ni petas vin helpi la Movadon pere de ni. Vi povas helpi per senrentaj pruntoj je ses jaroj aŭ per pruntoj je dek jaroj kun 2-procenta rento.

Per la rentodiferenco ni kunhelpas agantojn produkti esperantistojn, kaj intertempe ni gardas vian kapitalon por vi, en la stabila nederlanda guldeno.

Kontaktu nin pere de la Centra Oficejo de UEA aŭ skribu al la adreso de nia administranto:

Hans Bakker, Kastelenstraat 231,
1082 EG Amsterdam, Nederlando.

▷ **INSTITUCIO HODLER '68** ◁



en 1973. Li posedis tre riĉan Esperanto-Bibliotekon kaj validis kiel unu el la plej eminentaj lingvaj aŭtoritatoj pri Esperanto en Jugoslavio. Kvankam li mem apenaŭ verkis, preskaŭ ĉiu Esperanta eldonaĵo en Beogrado dum la lastaj jardekoj portas la signon de lia lingva kontrolo. Ŝaponjić estis dum tridek jaroj delegito de UEA.

JOSEF VÍTEK (1911-1983) mortis la 8an de novembro en Mělník, Ĉeĥoslovakio. Li lernis Esperanton en 1924. Kiel faka instruisto li instruis ankaŭ Esperanton kaj helpis la restarigon de la Movado en Ĉeĥoslovakio post la Dua Mondmilito. Li poste estis prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Vítek estis internacie konata i.a. pro siaj prelegvojaĝoj kaj komitataneco en UEA.

ALEXANDER STARKE (1891-1983) forpasis la 1-an de novembro en Erlangen, FR Germanio. Li famiĝis tra la Movado jam en 1923, kiam li – profesia aktoro – konvinkis siajn kolegojn ĉe la urba teatro de Nurenbergo prezenti *Natan la saĝulo* en la 15a Universala Kongreso. Post tiu sukceso li, kun sia edzino, regule prezentis en la monda kongreso. De 1928 ĝis 1932 Starke aŭdigis 60 prelegojn pri Esperanto ĉe la radiostacio de Nurenbergo. Post la Mondmilito li rekomencis siajn multflankajn prezentadojn en Esperanto. Germana Esperanto-Asocio plurfoje honoris lin i.a. pro preskaŭ 50-jara servado kiel delegito de UEA. Li lastatempe kunlaboris en la kompilado de la aperonta verko *La historio de la Esperanto-teatro*.

● **Britio:** Lastatempe la brita Movado faras serion de klopodoj, por influi la edukinstancojn de Londono pri la valoro de Esperanto-instruado. Gravan rolon en tio ludas i.a. Dave Wetzel, estro de la londona transporto. Krom diversaj personaj interparoloj kun ŝlosilaj funkciuloj, oni aranĝis semajnfinan seminarion, kie Grahame Leon-Smith instruis Esperanton al ses londonaj edukistoj – ĉefe inspektoroj. Oni planas plian tian seminarion. Krome, okazas kontaktoj kun ĉiu londona magistratano, por demandi pri ties sinteno al la Internacia Lingvo.

● **Ĉinio:** En la komenco de oktobro 1983, oni fondis en la urbo Chengdu Esperanto-asocion por Siĉuano. Tiu provinco de centra Ĉinio ludis gravan rolon en la evoluo de la Movado en Ĉinio. Krom diversaj gravaj lokaj funkciuloj, ĉeestis la inaŭguron de Siĉuana Esperanto-Asocio s-ro Li Naixi, vica ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo kaj redaktoro de la ĉinlingva Esperanto-revuo *La mondo*.

Loke

● **Pakistano:** La 6a jara kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio okazis de la 22a ĝis la 24a de decembro 1983 en la urbo Multan. La kongreso, kiun partoprenis plurdeko da esperantistoj el diversaj partoj de la lando, elektis novan estraron: ĝin gvidas s-ro Ghulan Nabi Parvaz (kiu en 1981 loĝis en Irano kaj supozeble tie eklernis Esperanton).

● **Ĉinio:** Sekve de la konfirmo (1981) de la Eduka Ministerio de Ĉinio, ke Esperanton oni rajtas instrui kiel nedevigan studobjekton en altlernejoj, ankaŭ naŭ universitat-nivelaj institucioj nun aranĝas tian kurson. Sep el la instruistoj, kiuj gvidas tiujn kursojn, estas diplomitoj de la porinstruistaj Esperanto-kursoj, kiujn organizis Ĉina Esperanto-Ligo.

● **Japanio:** Por vekti intereson inter la ĝenerala publiko kaj samtempe montri sian starpunkton pri Monda Komunika Jaro, Japana Esperanto-Instituto organizis publikan prelegkunvenon la 27an de novembro en la kvartalo Kanda, Tokio. Entute 80 personoj (duono neesperantista) aŭskultis du prelegojn: "Lingvistiko en la 20a jarcento kaj minoritataj lingvoj" de prof. Katuhiko Tanaka el la Universitato Hitotsubasi kaj "La japana popolo kaj internaciismo" de prof. Zyoze Takehara el la Fremdlingva Universitato de Kioto. Ambaŭ prelegojn oni publikigos en la japana kun Esperanta traduko.



● **Francio:** La 24an de septembro, en la urbo Pau oni oficiale inaŭguris Placon Zamenhof. La postan tagon la urbestro de Pau, s-ro André Labarrère (meze de la supra foto), kiu estas ankaŭ ministro de la franca registaro, oficiale akceptis kvindek da personoj. En la Oran Libron de la loka Esperanto-grupo, la ministro-urbestro notis: "Okaze de la inaŭguro de Placo Zamenhof estas agrable por mi subskribi la Oran Libron kaj rediri mian plenan aprobon al la esperantista movado kaj al ties aktivuloj en Pau".

INDEKSO

Revuo *Esperanto* 76a jarkolekto numeroj 925–936

Åberg, L. 37
Administrado 84
Aeronaŭtiko 37
Afriko 17, 57, 78, 95, 101, 103,
124, 165, 204
Akademio 43, 131, 138, 183
Albault, A. 138, 183
Allen-Smith, H.W. 196
Almada, F. de Souza 153
Alves Mata, F. 57
Angelova, M. 213
Antologioj 117, 139
Argentino 35
Atanasov, A.D. 193
Auld, W. 139, 149, 193
Aŭstralio 117, 122, 178, 186, 197
Aŭstrio 78, 177
Aŭtomatigo 118
Azio 104, 197
Bagger, P. 4
Bakarić, V. 57
Bakin 119
Bakker, H. 124
Balbin, J. 12
Bannier, L. 37
Barcsay, Zs. 54
Bardsley, C. 57
Barks, H. 196
Barrocas, A. 37
Beaucaire, L. 45
Belartaj Konkursoj 81, 92, 155, 166
Belgio 110, 163, 186, 197
Benczik, V. 27, 155
Bengtsson, I. 122, 153, 162
Berka, A. 196
Berveling, G. 13, 31, 190
Bibliografio 4, 14, 34, 53, 54, 75,
115, 136, 194, 214
Billet, G. 196
Blanke, D. 114, 135, 191
Blondeaux, A. 57
Boffejon-Fehr, H. 57
Bormann, W. 131, 138, 184
Bracquemond, G. 57
Brazilo 35, 117, 176, 178
Brennan, A. 191
Britio 138, 176, 216
Broccatelli, U. 209
Broczkó, P. 3
Bugge-Paulsen, R. 10
Bulgario 17, 78, 132, 162, 176, 203
Burundio 78
Butler, R.E. 143, 145

Carassa, G. 196
Carlevaro, T. 201
Carrouges, M.R. 32
CED 6, 96, 185
Centjara Jubileo 1, 4, 58, 63, 126,
161
Chicot, E. 111
Childs-Mee, A. 190
Clarke, W. 77
Collinder, B. 107
Conterno, C. 11, 32, 191
Cool, J.F. 213
Corsetti, R. 1, 63, 132, 134, 182
Ĉeĥoslovakio 77
Ĉilio 78
Ĉinio 41, 78, 79, 162, 176, 197
Damjanov, V. 77
Danlando 4, 79
Darbellay, Ch. 164
Daŝgupto, P. 43, 53, 73
Dawson, A. 46
De Kock, E. 73
Denĉev, D. 213
Despiney, B. 152, 182
Diplomatoj, 7, 144
Dombrowski, J.A. 117
Dombski, E. 77
Drlik, J. 77
Dubois, R. 57
Duc Goninaz, M. 190, 212
Dumas, J. 196
Dumitrás, M. 77
Ebura Bordo 57, 103
Edmondson, E. 196
Edwards, M. 77
Eichholz, R. 52, 69, 131
Eichhorn, H. 155
Ejsmont, T. 120
Ekspozicioj 18, 36
Eksteraj rilatoj 35, 89, 182, 187
Ekzamenoj 24
Eldonaĵoj:
Akademiaj studoj 1983 69, 131
Angoro 14
Bibliografio de vortaroj 53
Blanka sablo... 34
Blinda birdo, La 134
Ĉu ni kunvenis vane? 72
Der Esperantist 68
Don Juan' Tenorio 73
Du bulgaroj kantas en Esp. 213
Dua buso, La 37
En frua majmateno 52
Esperanto aŭtodidakte 190
Esperanto in the Mod. World 52
Esperanto kaj libereco 32
Esperanto und Wissenschaft 114
Facilaj dialogoj 190
Fermita urbo, La 134
Gardu la pacon! 75
Guido Gezelle 12
Hieraŭ - hodiaŭ - morgaŭ 32
Instruoj de Budho, La 113
Internacia kemio-vortaro... 53
Intima triptiko 72
Japaneskoj 73

Jazyk Esperanto 191
Juna amiko 139
Kapricaj raketoj 114
Korea Esperanto-vortaro 112
Korespondaĵo ludovikologia 114
Kulturaj informiloj de UEA 22, 91
Lappar, la antikristo 11
Laŭta vekhorloĝo, La 13
Liberté ou autorité... 192
Lingva esenco de Esp., La 193
Manlibro pri ĵurnalismo 135
Margene de la lernolibro 53
Metamorfozoj... 33
Metodiko en la praktiko 54
Mia vivo 31
Naŭa kanalo, La 12
Ne ĉiam... 52
Neologisma glosaro 213
Nia tondro 212
Nudpieda Gen 155
Plansprache und Nationalspr. 135
Por multoble plivastigi... 190
Post ŝtormo 212
Proverboj de M. Zamenhof... 31
Senlegenda biografio de LLZ 13
Siberio en neĝo 134
Soife mortas mi 52
Stranga kato 212
Strangled Cries 12
Ŝtona testamento, La 74
Tondaĵoj 52
Tridek roluloj 13
Unu tago post la alia 191
Verkoj de Verda Majo 192
Enketoj 189
Eriksson, R. 74
Eroŝenko, V. 212
Esperantologio 42, 46, 156, 198
Estrara Raporto 83-99
Eŭropa Komunumo 36, 109, 176,
186, 197, 209
Evolulandoj 177
Evva, M. 66
Faka agado 3, 8, 18, 66, 96, 163, 164
Farm, T. 77
Fervojistoj 77, 129
Financo 68, 85, 98, 108, 161
Fingalsson, H. 196
Finnlando 178
Fondaĵo A. Grabowski 26
Francio 57, 123, 131, 198, 216
Frank, H. 155, 169
Gáspár, S. 142
Génarmont, M. 117
Geologio 177
Germana DR 8, 68, 117
Germanio FR 36, 105, 138, 198
Golden, B. 32, 43, 53, 155, 167
Goldman, T.A. 65
Goodheir, A. 12
Gotoo, H. 113
Grigorov, A. 75
Grinŝpan, R. 215
Ĝuĝev, S. 138
Haase, M. 34, 52, 73, 76, 155
Haddon, R. 16, 139

Hagemann, O. 77
Halbedl, A. 77
Hanke, A. 208
Harry, R. 122, 186
Haszpra, O. 155
Hauger, R. 155
Hinda Unio 30, 36, 117, 176
Hispanio 36, 77, 197
Hodler, H. 61
Holzhaus, A. 31
Hueter, C. 196
Hujucz 119
Hungario 3, 17, 18, 26, 82, 141
Ĥristovski, T. 31
Ĥromada, R. 72
Infankongreseto 58, 174
Informadiko 3
Informado 4, 5, 36, 58, 68, 77, 78, 89, 138, 201
Instituto Hodler 68, 87
Instruado 17, 18, 28, 41, 79, 118, 130, 203, 204
Instruistoj 58, 131, 173
Interlingvistiko 18, 37, 118
Internacia Kongr. Universitato 155
Irano 10, 125
Isajev, M.I. 168, 191
Islamo 125
Israelo 18
Italio 36, 57, 76, 176, 198
Itô, K. 13
Izumi, Y. 112, 135
Jackson, I. 158
Japanio 17, 57, 119, 138, 177, 202, 203, 216
Jobba, G. 196
Jordan, D.K. 12
Jugoslavio 17, 28, 116, 117, 118, 176, 201, 207
Jullian, M.C. 33
Jung, T. 139
Junger, J. 135
Ĵurnalismo 18, 118
Kadrokursoj 110
Kalendaro 49
Kalocsay, K. 198
Kanado 197
Kao, J.B. 215
Kibernetiko 163
Kidosaki, M. 57
Kikusima, K. 30
Klunder, H. 105
Knappert, J. 102
Knežević, N. 196
Knoedt, L.H. 12, 14, 52, 72, 74, 75, 114, 133
Kolker, B. 192
Kolombio 78
Komunikado 168
Kongresoj:
UK 68a, Budapeŝto 15, 71, 141-157, 160, 189
UK 69a, Vankuvero 174, 205, 210
IJK 39a, Debrecen 16, 56, 158
Konstantinova, R. 196
Korea Resp. 18, 104, 177, 206


Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



Koresponda universitato 106, 188
Kotizoj 38, 179
Křivánek, L. 196
Kulturo 22, 91, 133
Kuroda, M. 155
Kurosima, D. 134
Laborplano 181
Landa agado 10, 95, 103, 104, 122, 186, 206
Lapenna, E. 44
Lapenna, I. 126
Lelievre, P. 204
Li, Hajpin 112
Li, Shijun 43
Libroj 17, 45, 119
Lienhardt, A. 190
Lindblom, R. 152
Lingvo 43, 69, 167, 208
Lingvo-problemo 6, 36, 186, 209
Linton, K.G. 70
Literaturo 133, 198
Long, K. 212

Ludovikito (pseŭd.) 114
MacGill, S. 13
Madagaskaro 57
Maertens, G. 2, 126, 142, 202
Magnusson, O.S. 215
Maitzen, H.M. 168
Mallia, C. 114
Malto 197
Marinov, Ĥ. 155
Masmoudi, M. 182
Masterman, D. 82, 189, 205
Maul, S. 135
Medicinistoj 177
Membrostatistiko 23, 39, 85
Mészáros, B. 155
Milojević, S. 21, 23, 41, 61, 101, 109, 121, 141, 201
Mine, Y. 212
Miyamoto, M. 134, 198
Molera, R. 57
Molnár, J. 196
Monda Komunika Jaro 3, 125, 145, 168, 216
Movado 1, 2, 61, 101, 121, 130, 132, 181
Muziko 77, 118, 172
Nealiancaj landoj 187
Nederlando 58, 197
Neergaard, P. 138
Nemere, I. 12, 134
Nigerio 124
Nijveld, W.J. 53
Nilsson, B. 188
Nordenstorm, L.G. 155
Norvegio 77, 78, 176
Novjorka Oficejo de UEA 6
Ockey, E. 53
Oficiala informilo 19, 38, 59, 79, 120, 140, 178, 199, 220
ÓhUiginn, L. 215
Pakistano 4, 216
Parlamentara agado 109, 216
Pasternak, B. 212
Petit, P. 215
Pettyn, A. 178
Pič, K. 14
Pilger, W.F. 13, 52, 69, 213
Pirlot, G. 203



Ĉu vi jam mendis salut-kartojn de UNICEF por Semajno de Internacia Amikeco — de la 19a ĝis la 25a de februaro 1984? Dek belaj kartoj (kun koloroj) kostas 11,00 guldenojn ĉe la Libroservo de UEA. La kartoj havas specialan surprizon okaze de la Semajno.

Piron, C. 111, 201
 Plehn, H.J. 155
 Pollando 37, 76, 116
 Portugalio 17, 118, 138
 Poupeye, K.M.J. 117
 Power, C.R.L. 155, 171
 Prelegvojaĝoj 138, 178
 Prohaskova, S. 215
 Pupteatro 207
 Puvrez, P. 196
 Radio 18, 44, 57, 60, 100, 138
 Radošević, Z. 77
 Ragnarsson, B. 22, 166
 Ranganayakulu, P.V. 138
 Reiersøl, O. 135
 Reunio 204
 Reynolds, M. 77
 Rezolucioj 151-153
 Ritterspach, G. 129
 Roattino, J. 196
 Rokicki, R. 156
 Rossetti, R. 33
 Ruando 17
 Rytenberg, E. 208
 Sadler, V. 21, 81, 120, 178
 Saheb-Zamani, M.H. 125, 139, 153
 Sala i Campamà 77
 Saletti, N. 158
 San-Marino 178
 SAT 37
 Schmid-Kajino, J. 57
 Schubert, K. 72, 114, 134, 192
 Scienca Eldona Centro 8, 96
 Sciencistoj 58
 Seguru, V. 159
 Sekelj, T. 187
 Sherwood, B.A. 43, 106, 169
 Silfer, G. 201
 Silling, N. 35
 Simpson, W.P. 117
 Skoltoj 37, 178
 So, Gilsu 155
 Söderberg, K. 107
 Sonderegger, W. 77
 Soveta Unio 5, 37, 58, 138, 197, 198
 Sporto 119
 Starke, A. 216
 Stomatologio 177

Bindilo aŭ Jarkolekto

Ni povas indiksi por vi la jarkolekton, sed la indekso tamen ne diros al vi, kie troviĝas la bezonata revunumero. Ion oni devas fari tiurilate! Ne eblas simple tiel lasi unuopajn revunumerojn treniĝi tra la bretoj, tirkesto, ĉambroj kaj jaroj. Jen du ideoj por solvi la problemon radikale:

Bele bindita jarkolekto kostas nun 36,00 (por Nederlando 37,80) gld., plus afranko. Atentu! Ni bindas nur tridek jarkolektojn, kaj la plimulto estas jam antaŭmendita.

Bela bindilo el kvazaŭleda plasto, por teni en perfekta ordo la numerojn de la aktuala jaro. Prezo 9,00 (por Nederl. 10,71) gld., plus afranko. Triona rabato ekde 3 ekz.

Støp-Bowitz, C. 10, 178
 Stuttard, M. 117
 Sutton, G. 104, 156, 185, 189
 Svedio 37, 117, 122, 177
 Svislando 17, 56, 126, 201
 Swart-v. Mourik, A.M. 77
 Symoens, E. 17, 118
 Szabó, K. 17, 149
 Szabó-Felső, F. 122
 Szerdahelyi, I. 153, 156
 Šaponjić, M.V. 215
 Štimec, S. 155, 207
 Šulco, R. 31, 54, 114
 Tangerud, O. 208
 Teatro 5, 17, 76, 82, 91, 119, 123, 138, 170
 TEJO 16, 35, 56, 76, 93, 116, 137, 200
 Terminologio 9
 Tišljär, Z. 28
 Tonkin, H. 6, 43, 146, 169, 170, 178
 Tonkin, J. 162
 Tóth, E. 11
 Tradukistoj 58
 Tradukoj 37, 198
 Trimbörn, K. 203
 Tucker, G. 24
 Tunizio 182
 Turismo 66, 110, 118, 119, 205
 UEA:
 75-jara jubileo 2, 61, 149
 Estraro 21, 81, 151
 Komitato 151
 Ueda, K. 77

Umeda, Y. 152, 178
 UN 89
 Unesko 90, 111, 128
 Universitatoj 18, 78, 79, 203, 216
 Usono 6
 Valano, J. (pseŭd.) 72
 Vatré, H. 213
 Veen, J.S. 155
 Veenstra, H. 77
 Verkistoj 198
 Verloren van Themaat, W.A. 53, 156, 212
 Vetter, R. 32
 Virina agado 78, 162
 Vítek, J. 216
 Volontula Servo 139
 Vortaroj 53, 102
 Wacha, B. 156
 Wallez, G. 103
 Wandel, A. 76, 198
 Ward, R.E. 196
 Welger, H. 65, 130, 169
 Wells, J.C. 4, 79
 Westermayer, M. 53
 Weulen-Kranenberg, M.H. 77
 Wiegand, H. 77
 Williams, L.J.P. 77
 Wingen, W. 196
 Witkam, A.P.M. 169
 Woessink, E.J. 153
 Wooding, N. 196
 Zairio 165
 Zamenhof, L.L. 31, 61
 Zondervan, C.B. 117

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Prezo: 57,00 (por Nederl. 59,85) gld., plus sendokostoj.

William Auld

KORESPONDA SERVO

Koresponda Servo Mondskala (KSM) de UEA havas novan prizorganton. La laboron transprenis: s-ro Robert Llorens, "Les Hortensias 2", 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

HINDA KOTIZPERANTO

Pro la kreskanta Esperanto-movado en Hinda Unio, montriĝis necese fiksi la kotizojn de UEA ankaŭ en hindaj rupioj, kion ni faris unuafoje por 1983. Kunlabore kun Federacio Esperanto de Bharato (FEB), UEA ĵus nomis kotizperanton, kiu ekde 1984 povas akcepti kotizojn kaj libromendojn en hindaj rupioj. Tiu kotizperanto fariĝas FEB-Kalkato, kaj la rekta respond-eculo estas: s-ro S.S. Pal, 35/1 Swami Vibekamanda Road, Howrah - 711 101, Hinda Unio. La rupiaj kotizoj estas jenaj por 1984: membro kun Jarlibro - 48 rupioj; membro kun Jarlibro kaj *Esperanto* - 120; abono al *Esperanto* - 72; abono al *Kontakto* - 36 rupioj.

ADRESSANĜO DESPINEY

D-rino Barbara Despiney, nova estrarano de UEA, ŝanĝas sian adreson ekde la mezo de januaro 1984. La novaj adreso kaj telefonnumero estas: 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; telefono: (1) 540 90 32.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: Kjoko Hata. Nederlando: S. Mensen. Svislando: Z.N. Boglari.

DONACOJ 1983 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: T. Metherall 70,00. Britio: Esperanto-Societo Grimsby 22,05. Francio: J.P. Boulet 55,11. Japanio: Yonemi Maeda 39,65. Nederlando: L. Demmen- daal 35,00; E.M. Maasbommel 100,00; Frisa Esperanto-Rondo 57,00; S.A.K. van der Zee 100,00. Festa renkontiĝo en Bergen op Zoom 100,00; T. Weidema 25,00; R. Vetter 100,00; R. Moerbeek 100,00; anonime 26,50. Sumo por 1983: 10 208,53.

FONDAĴO CANUTO: Britio: McClelland 50,00. Finnlando: I. Helsingius 127,20. Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00; S.A.K.v.d. Zee 100,00; W. Rodenhuis 60,00; F. Zeiler 70,00. Di-

versaj malgrandaj 7,74. Sumo por 1983: 4 460,17.

ĜENERALA KASO: Anonima: 2 000,00. Kanado: D. Hawley 176,60. Nederlando: J. Hut 18,83; G. Ellerman 30,00; S.A.K.v.d. Zee 100,00; W. Akkerman 58,00; K. Kos 36,24. Svislando: Honore al H. Buhlmann 41,96. Diversaj malgrandaj 11,40. Sumo por 1983: 8 258,66.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Sumo por 1983: 41,60.

ASOCIA KAPITALO: Britio: Here- daĵo Charles Bardsley 2 207,75. Sumo por 1983: 7 147,97.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Iranano, 20-jara, ŝatas korespondi. Parviz Gamshidi, P.O. Box 46, Shahr Shahr, Isfahan, Irano.

Kiu ŝatus helpi je la prespreparo de la Esperanta Bildvortaro? Mi povas oferti nur senkoston vivadon en nia bele situanta nova domo kaj ekzemplerojn de la bildvortaro post kiam ĝi aperos. R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0.

La kurzo de la stelo en 1984: Dum la tuta jaro 1984 1 stelo egalvaloros al 0,90 nederlandaj guldenoj. Informojn ĉe: Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando.

Pri ekonomiaj kaj poeziaj temoj deziras korespondi tutmonde d-ro Erco Baraka, Strato Zamenhof 10, IL-94 184 Jerusalema, Israelo.

Se vi regas malofte parolatan lingvon, bv. kunlabori je traduko de Esperanto-informilo. Mi eldonos samajn faldfoliojn en kiel eble plej multaj lingvoj. Por ricevi la Esperantan kaj anglan versiojn kun detalaj klarigoj pri la traduktasko skribu al: Esperanto, Bailieboro, Ontario, Kanado. K0L 1B0.

FONDAĴO KER DE TEJO: Sumo por 1983: 19 045,84.

JUBILEA JARO: Aŭstralio: T. Metherall 70,00. Nederlando: J. de Boer 50,00; P. Rijs 18,38. Sumo por 1983: 138,38.

PROPAGANDA KONTO: Sumo por 1983: 200,00.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00; W.P. Roelofs 15,00. Diversaj malgrandaj 1,00. Sumo ĉi-jara 625,52.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: R. Paintner 1009,77. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo por 1983: 6 724,57.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Sumo por 1983: 2 189,80.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj


Usonaj skoltinoj, 13- ĝis 15-jaraj, serĉas samaĝajn korespondantinojn el la tuta mondo. Skoltinestro: D-ino Nancy Hattaway, 1185 Meadow Lane 114, Concord CA 94520, Usono.

Se vi ne apartenas al la kategorio de "blindaj ŝafoj" (laŭ citaĵo de d-ro Zamenhof, en PIV pĝ 1055), legu la sukcesan aktualan broŝuron 64-paĝan de Ligue Française "Pro Unesco", 24 ave. Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Prezo (afrankite): 28 francaj frankoj aŭ ok poŝtaj kuponoj. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

18-jara iranano deziras havi gekorespondantojn: Saied Arib, Golsar Apt. Cactus Boluk 4, IR-41658 Rasht, Irano.

Leteresperon okazigos la Esperanto-Klubo de San Diego fine de majo 1984 kaj atendas por ĝi viajn salutojn kaj leterojn. Ĉiuj estos responditaj. Bonvolu skribi al Frank Helmuth, P.O. Box 918, Julian (San Diego), CA 92036, Usono.

Aĉetu la diskon (aŭ kasedon) Karnavaleto, por vi aŭ por donaci, ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk: 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkupono la deziratan objekton. Prezo (sendkostoj inkluzivitaj): disko 24 sv. fr.; kasedo 20 sv. fr. (*Tra l'mondo* elĉerpiĝis).



Malkovru la du duonojn de la nova **kontakto**

Unu duono havas nekomplikan lingvaĵon, facilan kaj taŭgan por novaj esperantistoj. Du duonoj havas stimulan enhavon – interesajn artikolojn el la tuta mondo, kiujn verkas plejparte gejunuloj, pri aktualaj temoj: ekzemple en 1984: Religio, Kooperativoj, Homo kaj maŝino, Krimo kaj Esplorado.

Membroj de UEA/TEJO malpli ol 26-jaraj kaj Patronoj de TEJO ricevas la revuon *Kontakto* sen plia pago. Aliaj povas aboni ĝin. Membriĝu aŭ abonu nun ĉe la kotizperantoj de UEA! Petu senpagan specimenon de ili aŭ de la Centra Oficejo.

Kontakto estas abunde ilustrita, en dukolora preso. Ĝi aperas ses-foje jare: jen dek du duonoj kiujn vi nepre malkovru!

”Kapablo trafe kaj klare prilumi la kernon de problemoj”
William Auld

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendkostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Ĉina monata gazeto en Esperanto



varbas abonantojn por 1984

1. Periodo de la abonvarba kampanjo:

Ekde la 1-a de novembro 1983 ĝis la 29-a de februaro 1984. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la abonvarba kampanjo, povas profiti rabaton de 20% kaj senpage ricevi koloran kalendaron en Esperanto.

2. Abonprezoj:

(abon-periodo)	(aktualaj prezoj)		(rabatitaj prezoj)	
	Gld.	US\$	Gld.	US\$
1 jaro	16,00	6,00	12,80	4,80
2 jaroj	27,00	10,00	21,60	8,00
3 jaroj	38,00	14,00	30,40	11,20

(La supraj prezoj ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Legantoj en tiuj landoj bonvolu atenti la enlandan EPĈ-anoncon aŭ konsulti la peranton.)

3. Abonvarbado estas bonvena

La abonvarbanto povas ricevi de ni ĉinstilajn memoraĵojn kiel donacon.

4. Tuj abonu ĉe via loka peranto

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (poŝtĉekkonto 37 89 64). Nederlandaj klientoj bonvolu ankaŭ aldoni 5% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

**La varbilon kaj senpagan specimenon
ni sendas laŭ peto**

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Ne travivu jaron sen Monato
Julie Winberg

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



REALIGU VIAJN REVOJN

**Specialaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj en Usono
kun esperantistaj ĉiĉeronoj, nur por esperantistoj!**

Limdato por mendoj prokrastita ĝis la fino de februaro.

Vivu viajn fantaziojn kaj venu al Usono por vidi, interalie, ĉi tiun fe-kastelon kaj...

ANTAŬKONGRESA EKSURSO (7-21 julio)

- Nov-Jorko
- Bostono
- Vaŝingtono
- Orlando
- Ĉikago
- Seatlo
- Viktorio (Kanado)

kaj multaj fascinaĵoj tieaj vidindaĵoj


Prezo inkluzivas 14 noktojn en du-personaj ĉambroj (privataj banĉambroj, klimatizo), transporton, ĉiĉeronadon ktp. Laŭbezone vi estos senpage transportita al Seatlo post la UK por la flugo hejmen. Speciala flugbileto "Vizitu Usonon" (aparte pagenda) kovros ĉiujn flugojn ene de Usono. Provizoraj prezoj:

Ekskurso \$US 1 245

Bileto "Vizitu Usonon" \$US 399

DEPONSUMO por antaŭ- aŭ postkongresaj ekskurso: po \$US 200/600 gld

Pagu al UEA kun indiko sur via pagilo
"Antaŭkongresa/Postkongresa ekskurso"



POSTKONGRESA EKSURSO (29 julio - 11 aŭg.)

- San-Francisko
- Hollywood
- Los-Anĝeleso
- Granda Kanjono
- Las Vegas
- Parko Yosemite
- regiono de San-Diego

kaj multaj aliaj lokoj

Prezo inkluzivas flugon de Vankuvero al San Francisco, loĝadon dum 13 noktoj en hoteloj (privataj banĉambroj, klimatizo, televidilo), transporton, ĉiĉeronadon ktp. Ekskurso nun unu tagon pli ol anoncote en septembro, sed provizora prezo nun fariĝis \$US 1 175

Dum ambaŭ ekskursoj vi havos eblecon viziti lokajn esperantistojn hejme.

Kelkaj esperantistoj jam mendis ambaŭ ekskursojn por certigi, ke ilia vizito al la 69a UK estos vere neforgesebla! Por tiu mendo bv deponi \$US 400

Post ricevo de via deponsumo ni sendos kvitancon kun luksa broŝuron kun plenaj detaloj pri la ekskursoj. Petu tiun broŝuron de UEA se vi ankoraŭ ne decidis mendi. UEA helpas vin aranĝi vian flugon al Ameriko kaj havigos la specialajn biletojn "Vizitu Usonon" al la antaŭkongresaj ekskursontoj.

Organizado: Esperanto-Vojaĝservo de ELNA en kunlaboro kun UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Bankkonto n-ro 25.52.89.804 Bank Mees & Hope, Rotterdam. Poŝta ĝirkonto de la banko estas pĉk (nederlanda) 6400 – indiku nian bankkontonumeron sur la pagilo kiel la celon de la pago, se vi pagas tiel.

Survoje al la 69a UK en Vankuvero jen venas

Invito por viziti Usonon

kaj partopreni en la najbara Portland (Oregono), de la 14a ĝis la 19a de julio 1984, du aliajn aranĝojn:

3a Tutpacifika Kongreso 32a Kongreso de ELNA

Ambaŭ kongresoj okazos en la bela Universitato de Portland. La organizantoj antaŭvidas i.a. ekskursojn, ĵaz-koncerton kaj bankedon. Tie funkcios ankaŭ laborgrupoj pri tute ekscitaj temoj: *virismo en la lingvo, komputiloj kaj lernado de Esperanto, problemoj de la pacifika baseno, Mondvida Tago – mondnivela soleno...*

Pliaj informoj kaj aliĝilo tuj haveblaj ĉe:

LKK, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
p/a Jim Deer, 11905 SW Settler Way,
Beaverton, OR 97005, Usono.

Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapiro kaj kovertoj,** kun surprisitaĵoj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluaĵo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 x 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto.* Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

**Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.**

Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!